1973 novembro
66-a jaro
n-ro 815 (11)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

"Esperanto programita" en Britujo



Vi trovos

ke bedaŭrinde denove malfruas la revuo, kiu principe devus aperi la 1an de la koncerna monato sed en la lastaj monatoj aperis kun proksimume 1-monata prokrasto. Ni pro tio pardonpetas al ĉiuj legantoj, certigante samtempe, ke ni faras nian eblon por reakuratigi la aperadon. Jam ĉe tiu ĉi numero ni sukcesis rekapti pli ol unu semajnon, kaj ĉe la postaj numeroj ni iom post iom plene likvidos la malfruon. Pro la samaj kaŭzoj — diversaj ŝanĝoj en la Centra Oficejo — aperos malfrue ankaŭ la Dua Parto de la Jarlibro 1973. Ni petas la paciencan indulgon de la membroj.

Sur la paĝoj 189-192 vi trovos la tekston de la Tria baza laborplano de UEA, akceptita en Beograd ĉi-jare. Presite sur la kvar mezaj paĝoj, ĝi estas facile elprenebla el la revuo, se oni deziras konservi ĝin kune kun aliaj labordokumentoj.

Enhavo

181 Al Hamburgo por ĝui feriojn (Bormann)
182 Opinio-sondo pri Esperanto en Francujo
182 La 46a Kongreso de SAT
183 Evento en franclingvaj landoj
183 Varman gratulon al prof. Lapenna
184 Esperanto en perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo
186 Rapidu aliĝi antaŭ la jarfino (59a Universala Kongreso, Hamburg, FR Germanujo, 1974)
187 Leteroj de legantoj
187 Nekrologo (Bete)
188 Reorganizi la gazetaran servon (Milojević)
189 La Tria baza laborplano de UEA
193 Komenco bona — ĉio bona
194 Maŭra — la mistera poeto (Duc Goninaz)
195 Recenzoj
195 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
196 Loke — fake — persone (mallongaj novaĵoj)
198 TEJO-paĝo
198 Esperanto en radio
199 Oficiala informilo
200 Anoncetoj

La kovrilo

La kurso "Esperanto programita", originale verkita de Hermann Behrmann kaj lanĉita en FR Germanujo en la formo de 4 kajeroj kun akompanaj diskoj, ĝuis grandan sukceson en FRG kaj aliaj landoj kaj kondukis al adaptoj de la kurso por alilingvaj teritorioj. En Nederlando kaj Belgujo, kelkaj centoj da interesitoj enskribiĝis por la kurso, kiun en la nederlanda eldono prizorgas Paul Peeraerts en Antverpeno kaj Oene Hoekstra en Schoorl. La britan eldonon presigis Brita Esperantista Asocio sub gvido de la prezidanto de BEA, s-ro Grahame Leon-Smith. La interesiĝo en Britujo montriĝis kontentige granda. Unuasola mencio en la tutlanda ĵurnalo "Guardian" rezultigis ĉ. 400 informpetojn. Entute la brita sekcio de la kurso kalkulas nun ĉ. 1500 lernantoj. Sur la foto: Grahame Leon-Smith kun evidenta plezuro ekatakas la monteton da korespondaĵoj.

esperanto, novembro 1973

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.
Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).
Ĉefredaktoro: V. Sadler.
Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).
Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.
Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.
Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).
Telefono: (010) 36 15 39.
Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.
Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.
Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.
Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.
Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.
Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.
Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.
Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.
Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.
Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.
Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

Al HAMBURGO por ĜUI FERIOJN

invitas la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato

Kiam antaŭ jardekoj ni proponis kongresvojaĝojn al esperantistoj, tiuj veturoj enviciĝis inter aliaj pasigadoj por ferioj. Ĉu nun frekventi Esperanto-Kongreson aŭ kuraciĝi en banloko aŭ viziti belpejzaĝan hotelon – la kondiĉoj egalis. Tio profunde ŝanĝiĝis. En la kapitalismaj landoj aranĝi feriojn fariĝis komercista tasko, kaj la amasproduktado de feriofeliĉo enkondukis ege rimarkeblajn prezreduktojn. La ofertoj estas abundaj, kontentigaj kaj malkaraj por ĉiuj, kiuj partoprenas en tiu raciigita veturado. Kompare kun tio la vizito al Universala Kongreso de Esperanto, plejofte individua vojaĝo en grandurbon, estas kostega. En la socialismaj landoj la prezrilatoj estas tute apartaj kaj la devizaj problemoj grandaj. La homoj kun tie alta vivnivelo en eksterlando troviĝas sub financa premo. Konsekvence: ni petas multan monon de niaj esperantistoj, kiam ni invitas ilin partopreni nian 59an en Hamburgo. Pri tio ni devas esti konsciaj, kaj pro tio ni devas unuflanke klopodi pri kostŝparoj kaj aliflanke vere oferti tutan komplekson da rekompencoj. Jen la gvidlinio por la preparlaboroj de la Universala Kongreso en Hamburgo.

Unu el la ĉefaj allogaĵoj de Esperanto-Kongreso estas la kunvivado de la esperantistoj, la efektiva formigo de "Esperantujo" por sep tagoj de la jaro. Tiam la esperantistoj praktikas sian komunaĵon. Ili aplikas rekte siajn mondvastajn rilatojn al homoj el aliaj landoj. Pro tio la kongressemajno estas por multaj esperantistoj la kulmino de la tuta jaro. Vere vivas dum la Kongreso, kio estas la statuta celo de UEA: "Plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo". Dum la aliaj semajnoj la alia tasko el la du de la statuto, "disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto", tiu pena laboro, staras en la centro. Sed la kongreso signifas la transpaŝon el la teorio pri la estonteco en la praktikon de la nuntempo, en la senteblan momenton de realeco.

Ĉar estas tiel, renkontiĝoj ludas altan rolon dum kongreso. La Universala Kongreso en Hamburgo ofertas taŭgan kadron por tio. En la halo de la kongresejo estas multege da foteloj, kaj antaŭ la kongresejo estas granda parko kun reto de promenvojoj kaj multaj benkoj. Kompreneble troviĝas restoracio/kafejo en la kongresejo. Tute proksimaj estas aliaj restadejoj, bonkvalita stacidoma restoracio, mondkonata "Alster-Pavillion"-kafejo apud enurba lago, aŭ etaj bierkonsumejoj sur la varfoj, kie oni povas rigardi la ŝiptrafikon de la rivero Elbe kaj la haveno. La restoracio en la supro de la televida turo, kvin minutojn for de la kongresejo, turniĝas unufoje dum unu horo.

Ripozigaj noktoj (aŭ la resto de ili, kiun lasas amikaj konversacioj aŭ ravaj amuzoj) estas bezonataj por reakiri fortojn. La oferto de litoj en pensionoj kaj hoteloj estas tiel granda, ke por ĉiu kun eĉ nur iomete plena monujo troviĝos adekvata ĉambro. Se la monrimedoj estas sufiĉaj, la pinton de agrableco laŭ proksimeco estas la hotelo "Loews Plaza" en la sama konstruaĵo kiel la kongresejo. Kiam pluvas, gasto de tie, iranta al kongresa programero tra koridoro, ne malsekiĝas. Kaj kiam la suno brilegas, oni ne devas forlasi la agrablan temperaturon de hotelo kaj kongresejo klimatkontrolitaj. Tiu hotelo, cetere, postulos de kongresanoj por unulita ĉambro 74 DM kaj por dulita ĉambro 98 DM tage (inkl. de imposto, servmono, matenmanĝo).



Nova "Alster-Pavillion"-kafejo en Hamburgo.

El kutime 2 000 aliĝintoj al Universala Kongreso, ĉiuj ĉeestas la solenan malfermon kaj multaj vizitas la kulturajn aranĝaĵojn: nacia (t.e. en 1974 germana) vespero, internacia vespero, teatraĵo, kaj la balon. Spertoj montras, ke laborkunsidoj aŭ sciencaj prezentaĵoj altiras maksimume kelkcenton da homoj. Tio signifas, ke por plimulto de la kongresanaro evidente antaŭrangas la ĝenerala oferto de bela urbo kaj esperantista atmosfero. Estas do tute prave, ke kongresorganizantoj klopodas kontentigi *kaj* la bezonojn de la aktivuloj, kiuj faras siajn laborojn dum la kongreso, *kaj* tiujn de la multaj homoj, kiuj ricevas sian kvanton da kontentigo el la pli malpli turisma parto de la kongreso. Hamburgo en 1974 estas ĝusta celo por ĝui feriojn!

D-ro Werner Bormann

Opinio-sondo pri Esperanto en Francujo

En la junia numero de "Esperanto" ni jam aperigis sciigon pri la naci-skala opinio-sondo en Francujo (p. 102). Nun la rezultoj de la opinio-sondo organizita de UFE en Francujo estas listigitaj en la apuda tabelo, kvante kaj procente pri la tuta lando, nur procente pri tri regionoj.

Tiuj ĉiferoj montras, ke ĉ. 85% de la francoj konas almenaŭ la ekziston de Esperanto, kvankam duono ne scias, ke ĝi estas pli facile lernebla ol la aliaj lingvoj. Krome, nia agado en la kampoj arta kaj politika estas apenaŭ konata (demandoj 4a kaj 5a).

La respondoj al la 6a demando meritas komparon laŭregione. En Suda Francujo (Langvedoka Fed-o), Esperanto ĝuas tre favoran pozicion: 47,4% elektis ĝin kiel eŭropan komunikilon, antaŭ la franca; la angla staras en la tria loko. En Orienta Fed-o, Esperanto denove venas unue, sed la angla superas la francan; kontraŭe en la Pariza regiono la angla okupas la unuan lokon!

Oni rimarkos, ke la plimulto estas favora al la enkonduko de Esperanto en la abiturientan ekzamenon. Tamen, tion ankoraŭ ne konsentis la franca registaro ...

KONGRESO en KANADO

La 46a Kongreso de SAT

estis la unua ekstereŭropa SAT-Kongreso. Ĝi okazis en Toronto (Kanado) de la 30a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 1973. La Kongreso nombris 208 partoprenantojn el kvin kontinentoj.

Dum la solena malfermo la Kongreson salutis reprezentanto de Ontaria Sindikata Federacio nome de la 700 000 membroj de tiu organizaĵo. Rezulte de viglaj diskutoj en la laborkunsidoj la Kongreso akceptis Gvidrezolucion, kiu celas principe disvolvon de agado de SAT-anoj inter laboristaj neesperantistaj manifestacioj kaj organizaĵoj. La kanada televido elsendis intervjuojn pri la Kongreso kaj Esperanto en la franca kaj angla lingvoj. En ĵurnalo aperis artikolo de Mark Starr.

Krom laborkunsidoj, la Kongreso disvolvis ankaŭ kulturajn kaj distrajn erojn, kiel Interkultura Vespero pri diversnaciaj kulturoj konserviĝintaj en Kanado, kaj efektivigis revon de multaj eŭropanoj vidi la Niagaran kaskadon per la tuttaga ekskurso al tiu impona naturvidindaĵo. Kiel kutime funkciis la Somera Universitato. La partoprenantoj aktive diskutis post la altkvalitaj prelegoj. La oficiala postkongresa semajno havis sian adreson en Montrealo. Sed ĉi-foje ĝin sekvis post-postkongreso kun ekskursoj al Wasaga Beach (strando) kaj al rezervejo de sovaĝaj bestoj kaj boatekskurso.

REZULTOJ

Nombro de demanditoj: **1163**

DEMANDOJ		Sume kvanto	Sume %	Langvedoka Orienta %	Pariza %	
1) ĉu vi jam aŭdis pri Esperanto?	JES	991	85,2	83,1	84,3	88,9
	NE	172	14,8	16,9	15,7	11,2
2) ĉu vi scias, ke ĉiujare ie en la mondo okazas U.E.K.?	JES	598	51,4	53,6	50,–	42,1
	NE	565	48,6	46,4	50,–	57,9
3) ĉu vi scias, ke en Parizo oni ludas Esperanto-teatraĵojn?	JES	139	12,–	14,8	9,–	11,7
	NE	1024	88,–	85,2	91,–	88,3
4) ĉu vi scias, ke 19 departementaj konsilantaroj voĉdonis favore al instruado de Esperanto?	JES	157	13,5	16,8	9,6	13,4
	NE	1006	86,5	83,2	90,4	86,6
5) ĉu vi scias, ke Esperanto estas pli facile lernebla, ol iu ajn alia lingvo?	JES	589	50,7	49,4	51,9	50,8
	NE	574	49,3	50,6	48,1	49,2
6) laŭ vi, kiu lingvo el la sekvantaj devus esti la lingvo de E.E.K., kaj poste de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo?						
Esperanto		475	40,9	47,4	40,3	25,1
Franca		164	14,1	14,4	13,–	17,–
Angla		222	19,–	10,4	23,–	29,8
Germana		7	0,6	0,6	0,3	1,1
Alia lingvo aŭ sen opinio		295	25,4	27,2	23,4	27,–
7) ĉu vi opinias, ke Esperanto devus esti elektebla lingvo en la abiturienta ekzameno?	JES	794	68,3	71,–	58,9	76,6
	NE	143	12,3	7,7	17,4	12,9
	SEN OPINIO	226	19,4	21,3	23,7	10,5

Evento en franclingvaj landoj

La aperigo en la serio de la fame konata metodo ASSIMIL de "L'Espéranto sans peine" ("Esperanto sen peno").

La 12an de decembro 1973, de la 18a ĝis la 20a, sur la teraso Martini, 52 Champs Elysées, F-75008, Unuiĝo Franca por Esperanto konsente kun Assimil* inaŭguros per koktela akcepto por la gazetaro aperigon de *L'Espéranto sans peine* ("Esperanto sen peno") en la serio de la fame konata metodo ASSIMIL. Al ĵurnalistoj estos prezentita la nova libro, verkita de J. Thierry, lingve kontrolita de prof. G. Waringhien. Ĉi tiu moderna lernolibro, kiu baziĝas sur legado de mallongaj vivaj tekstoj (plej ofte konsistantaj el dialogo aŭ letero) kaj kiu celas instrui la parolatan lingvon per ripeta asimilado de la elementoj en ĉiutagaj frazoj, estas destinita precipe por memlernantoj, al kiuj mankas la tempo por ĉeesti kurson, sed restas disponeblaj kelkaj minutoj ĉiutage por legi sola unu- du paĝojn.

La libron povas akompani serio da diskoj, kasetoj aŭ bendoj kun la voĉoj de s-inoj F. Ballaven kaj J. Ravŝelj, f-ino S. Bonnet, de akademianoj R. Bernard, C. Minnaja kaj J. Wells kaj de s-roj M. Audibert kaj H. Gonin.

La tuta kurso konsistas el tri fazoj: la unua, por ses semajnoj, estas nur pasiva (laŭtlegi kaj kompreni); la dua, por ok semajnoj, estas pasiva kaj aktiva (necesas krome reesprimi en Esperanto la tradukitan parton); la lasta, por ses semajnoj, estas nur aktiva. Sed ĉi tiu oportuna disdivido prezentas elastecon tiel, ke ĉiu lernanto povas adapti ĝin al sia propra ritmo; eĉ kursgvidantoj povos laborigi siajn lernantojn surbaze de la libro, havigante al ili kontrolon kaj pliajn klarigojn.

En tri jaroj ĉi tiu libro estos la kvara en Francujo publikigita de neesperantistaj eldonejoj, nome: *Vocabulaire espéranto* de M. Duc Goninaz (Ophrys), *Je parle espéranto* de J. Thierry (Marabout-Flash), de P. Janton (Que sais-je?" P.U.F.).

* ASSIMIL – Paris. Agentejoj: Bruselo, Amsterdam, Düsseldorf, Lausanne, London, Madrid, Montréal, New York, Torino.

VARMAN GRATULON AL PROF. LAPENNA

Plia scienca honorigo de la prezidanto de UEA



La prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Ivo Lapenna, doktoro pri juraj sciencoj (Universitato de Zagreb) kaj doktoro hc. pri Internaciaj Rilatoj (Universitato de Fort Lauderdale, Florido, Usono), kiu jam antaŭe atingis la profesorecon pri internacia juro kaj internaciaj rilatoj en la Universitato de Zagreb, ĵus en novembro, estas distingita per plia universitata titolo de profesoro pri kompara juro (soveta kaj orienteŭropa) en la Universitato de Londono.

En sia jura praktiko prof. Lapenna, krom la pedagogia aktiveco, plurfoje estis ŝarĝita per gravaj juraj misioj. En 1946 kiel eksperto pri internacia juro li estis vokita al Pac-Konferenco en Parizo, en 1947/48 li pledis antaŭ la plej alta jura instanco de la mondo, la Internacia Kortumo en Hago, kaj en 1948 estis elektita ekstera membro de la Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj.

Prof. Lapenna publikigis plurajn sciencajn verkojn en siaj fakoj. Menciindaj estas "Unuiĝintaj Nacioj" kaj "Historio de Diplomatio" en la kroata lingvo, "Sovetaj konceptoj de Internacia Publika Juro" en la franca, "Ŝtato kaj Juro: Soveta kaj Jugoslava teorioj" kaj "Soveta Kriminaljura Politiko" en la angla. Liaj multnombraj fakaj artikoloj aperis en la plej gravaj juraj periodaĵoj de diversaj landoj en la lingvoj kroata, angla, franca, germana kaj itala.

En Esperanto prof. Lapenna verkis la popularsciencan libron "Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo" (1952). Krome, aperis en Esperanto pluraj liaj fakaj artikoloj, precipe pri la homaj rajtoj. Per siaj prelegoj en ISU, preskaŭ ĉiujare ekde 1948, li ne nur kontribuis al klarigo kaj popularigo de diversaj problemoj en la sferoj de internacia juro, kompara juro kaj internaciaj rilatoj, sed ankaŭ riĉigis la juran terminaron en la Internacia Lingvo. La plimulto de tiuj prelegoj estis poste publikigitaj, interalie en "Internacia Jura Revuo". Li helpis en la verkado de PIV kiel kunlaboranto por la fakoj juro kaj parolarto.

La plia honorigo de prof. I. Lapenna en lia faka laboro kontribuas al la prestiĝo ankaŭ de UEA, en kies gvidado li partoprenas ekde 1938 unue kiel estrarano, poste kiel ĝenerala sekretario kaj ekde 1964 kiel ĝia prezidanto.

Monumenta verko de CED baldaŭ aperos

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO: Faktoj

CED kun plezuro anoncas, ke baldaŭ aperos la monumenta verko ESPERANTO EN PERSPEKTIVO: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo. Tiu libro, kiun CED rigardas kiel kronon de sia multjara esplora kaj dokumenta laboro, estas jam plene kompostita kaj nun enpaĝigata. Paralele estas farataj la du indeksoj: persona kaj tema.

La libro estas verkita de prof. d-ro I. Lapenna, ĉefredaktoro, kaj U. Lins kaj d-ro T. Carlevaro, redaktoroj. D-ro V. Sadler estas la teknika redaktoro. Aldone al la dokumentoj en la arkivo de CED, kolektitaj dum multaj jaroj; aldone al studoj, artikoloj kaj enketoj, faritaj de diversaj kunlaborantoj de CED, kiel ankaŭ diversaj antaŭaj publikaĵoj, la verkintojn helpis kvindeko da kunlaborantoj en diversaj landoj. La ĉefredaktoro kaj redaktoroj fidas, ke, rezulte de tiu multjara laboro kaj harmonia kunlaborado en la redakta komitato kaj kun la kontribuintoj, en la verko estas objektive prezentitaj, kun maksimuma ĝusteco, ĉiuj iom gravaj faktoj pri la Internacia Lingvo. Ili ankaŭ klopodis maksimume harmoniigi la interpreton de faktoj kaj fidas, ke la donitaj analizoj korekte reflektas la realaĵon.

Titolo kaj enhavo

La originala ideo estis publikigi duan, ĝisdatigitan kaj iom ampleksigitan eldonon de la libro *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)*, publikigita de CED en 1954, sed jam delonge plene elĉerpita. Ju pli evoluis la laboro je la nuna verko, des pli evidentiĝis, ke tute ne povos temi pri dua eldono de la menciita libro, sed pri esence nova verko. Post longaj diskutoj en la redakta komitato, interkonsiliĝoj kun diversaj personoj, eĉ kun membroj de la Akademio, oni fine akceptis la supran titolon. Ĝi plej bone spegulas la enhavon de la verko, ĉar Esperanto en ĝi estas metita en perspektivon: historian, rilate la rolon en la nuntempo kaj koncerne la estontecon.

La verko konsistas el Antaŭparolo, ses partoj, persona kaj tema indeksoj. Ilustraĵoj en diversaj ĉapitroj kompletigas la tekston kaj vigligas la tuton.

La Unua parto, titolita "Esperanto kiel Solvo de la Lingva Demando en la Mondo", konsistas el 4 ĉapitroj, en kiuj estas pritraktitaj la lingva problemo en internaciaj rilatoj, la formiĝo kaj evoluo de Esperanto, la Esperanta kulturo, la instruado de la Internacia Lingvo.


La Dua Parto – "Esperanta Literaturo" – enhavas en ses ĉapitroj amason da informoj kaj analizoj pri la karakterizoj de la esperantlingva literaturo, pri originala beletristiko, traduka beletristiko, scienca, popularscienca kaj faka literaturo, fakaj terminaroj, periodaĵoj.

"En Servo de Kulturaj Interŝanĝoj, Praktikaj Celoj kaj Internacia Solidareco" estas la titolo de la Tria Parto. Ĝi rilatas al ĉefaj kulturaj manifestacioj en Esperanto aŭ pere de ĝi, al la uzo de la lingvo por praktikaj celoj kaj al Esperanto kiel instrumento de internacia kompreniĝo. Ankaŭ tiu ĉi parto entenas multajn faktojn kaj detalojn pri la vasteco de la kultura kampo, belartaj konkursoj, teatraj prezentadoj, artaj festivaloj, filmoj, kursoj kaj seminarioj, radio-elsendoj, utiligo de la lingvo sur la kampo de komerco, industrio, turismo, mondaj ekspozicioj, poŝtaj servoj ktp. Aparte estas pritraktita la praktika humaneca laboro kaj diversaj grandaj kampanjoj celantaj plibonigon de internacia kompreniĝo.

La Kvara Parto – la plej ampleksa el ĉiuj – rilatas al "Historio kaj Nuntempa Organizo de la Esperanto-Movado". Ĝi havas 7 ĉapitrojn, en kiuj estas analizitaj la historio de la monda organizo, la landaj organizaĵoj por disvastigo de Esperanto, la organizaĵoj por fakaj kaj specialaj celoj, la historio kaj nuna strukturo de la junulara Esperanto-Movado, la konstruado de moderna UEA, la laborista Esperanto-Movado kaj la ĉefaj institucioj, ekzemple la Akademio, IEMW, ISU k.a.

La Kvina Parto – "Atakoj kaj Apogoj" – konsistas nur el 2 ĉapitroj. En ĉap. 21 estas prezentitaj kaj analizitaj diversaj persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo ekde la plej frua periodo ĝis la nuntempo; en ĉap. 22 estas detale pritraktita la demando de komuna lingvo antaŭ internaciaj institucioj: Ligo de Nacioj, Unesko kaj UN.

Kvankam preskaŭ en ĉiu ĉapitro, depende de ĝia enhavo, estas ĵetita rigardo al la estonteco, nome al verŝajna plua evoluo kaj novaj atingoj en la pritraktita sfero, tamen la Sesa Parto estas plene dediĉita al la "Perspektivoj por la Estonteco". Ĝi konsistas nur el ĉap. 23, en kiu estas koncize priparolitaj la esencaj antaŭkondiĉoj por rapidigi la progreson. En ĝi estas



Prof. I. Lapenna kaj U. Lins transdonas la manuskripton de "Esperanto en perspektivo" al la direktoro de la Centra Oficejo.

kaj analizoj pri la Internacia Lingvo

tuŝita la grava demando pri spontaneco kaj la signifo de organizita laboro. En tiu konkluda parto troviĝas ankaŭ jenaj vortoj:

Atenta leginto de tiu ĉi verko ne povas ne enpensiĝi almenaŭ dum momento pri la miloj da personoj, kiuj devis oferi multajn milionojn da labortagoj por produkti tion, kion la titolo de la libro seke nomas "Faktoj pri la Internacia Lingvo", dum aliaj centmiloj ellernis kaj ekuzis la lingvon, en la komenco eĉ ne atendante ian "praktikan utilecon". Rezulte – malgraŭ ĉiaspecaj obstakloj, ekde antaŭjuĝoj ĝis militoj kaj konsciaj kontraŭstaroj pro motivoj de kultura imperiismo, aŭ eĉ rektaj persekutoj – la lingvo sukcese disvastiĝis tra la mondo kaj socie enradikiĝis...."

La tuta verko finiĝas per jena alineo:

Sur la sojlo de la sekva periodo UEA staras pli forta ol iam antaŭe kaj ĝi povas eĉ konsiderinde plifortiĝi. Inspirita de la vere imponaj ĝisnunaj atingoj de la Internacia Lingvo, UEA mobilizu ĉiujn fortojn por ekspluati la favorajn kondiĉojn de la nuna historia epoko kaj amase disvastigi la lingvon. Oni memoru, ke konvenaj historiaj okazoj ne kutimas ripetiĝi. La pluaj perspektivoj por Esperanto estas pli ol kuraĝigaj. La signifo de UEA kaj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj por realigi ilin kiel eble plej baldaŭ estas decide grava.

Kelkaj pliaj informoj

Ĉiu ĉapitro havas subĉapitrojn kaj ofte pliajn subdividojn, maksimume kvar. Ekzemple, ĉap. IV konsistas el 7 subĉapitroj. Unu el ili, 4.3 "Lernolibroj kaj Instruaj Helpiloj", konsistas el 4 sekcioj: 4.3.1 "Nacilingvaj Lernolibroj"; 4.3.2 "Internaciaj Lernolibroj", ktp. Ofte la sekcioj konsistas el kelkaj subsekcioj laŭ la sama sistemo. Tiu sistemo konsiderinde faciligas la orientiĝon en la amaso da materialo entenata en la libro. Krome, la referencoj de unu parto al alia estas tre precizaj. Tio estas tre grava, ĉar neeviteble la samaj aferoj estas menciitaj aŭ traktitaj en diversaj lokoj, en iuj pli detale ol en aliaj. Kune kun la indeksoj, la aplikita sistemo ebligas rapide trovi kiun ajn informon.

En la fino de ĉiu ĉapitro troviĝas "Esenca Bibliografio" rilatanta al la temo de la koncerna ĉapitro, sed en la fino de la tuta verko estas publikigita konciza bibliografio por la tuto.

Fine, utilas mencii, ke *Esperanto en Perspektivo* prezentiĝas kiel unueca granda tuto, en kiu ĉiuj partoj, ĉapitroj kaj iliaj subdividoj estas kunligitaj. Aliflanke, ĉiu el la ses partoj estas per si mem unu tuto. En multaj kazoj ankaŭ la unuopaj ĉapitroj aŭ subĉapitroj, eĉ individuaj sekcioj de la subĉapitroj estas tiel kompletaj, ke ili povas preskaŭ senŝanĝe esti utiligataj por verkado de artikoloj kaj prelegoj, aŭ por publikigo en nacilingvaj tradukoj. Fakte, unu el la ĉefaj celoj de la verko estas havigi al la aktivuloj abundegan materialon por plua disvastigo de la lingvo.

En la nuna momento, antaŭ ol estas farita la enpaĝigo, ankoraŭ ne estas eble diri precize kiom da paĝoj havos la libro, sed estas tute certe, ke la nombro de paĝoj turniĝos inter 700 kaj 800 en formato de *Retoriko*. Ankaŭ la prezo ankoraŭ ne povas esti fiksita. Kompreneble, tia grandega verko, ilustrita kaj bindita, certe ne povos esti malmultekosta. Tamen, CED klopodas atingi, ke la vendoprezo estu kiel eble plej favora.

KOREKTO DE FALSA INFORMO

En la gazeto "Heroldo de Esperanto" de la 3a de septembro 1973 estas skribite sur p. 2: "En la ĉapitro pri CED Prof. Lapenna anoncis sian definitivan decidon eksiĝi kiel ĝia direktoro. La Komitato konsentis, ke 'la afero ne estas matura' ". Sur p. 4 de la sama numero estas skribite pri Prof. Lapenna: " Li eksiĝis kiel Direktoro de CED, kiun li fondis antaŭ 21 jaroj". Tiu informo estas komplete malĝusta. Prof. I. Lapenna restas *honorofica* direktoro de CED kaj plu gvidos tiun institucion. Tute alia afero estas lia varma deziro "transdoni la pluan gvidadon de CED .... al alia kompetenta persono kun sciencaj kvalifikoj en la sfero, pri kiu okupiĝas CED..., se troviĝas taŭga solvo". Tian solvon la Komitato ne trovis, kaj sekve restas la sama situacio. Kompreneble, iam necesos trovi solvon kaj, se iel eble, transporti CED plene al Rotterdam, kie ĝi povus esti taŭge ligita al la Biblioteko de la Asocio.

Tiom por orientiĝo de la kunlaborantoj kaj subtenantoj de CED, kiuj hazarde legis la supran plian misinformon de tiu gazeto.

Donacoj por CED en 1973

	£
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1,00
Gesinjoroj Laurie, Britujo	4,00
S-ino B. Seddon, Britujo	3,00
D-ro J.C. Wells, Britujo	50,00
S-ro Joshimi Umeda, Japanujo	2,00
S-ro E. Burg, Nederlando	3,58
S-ro G. Pirlot, Belgujo	0,46
Gesinjoroj Holmes, Britujo	10,00
S-ro E. Carlén, Svedujo	13,59
S-ro G. Becker, Germanujo	30,18
Novzelanda Esperanto-Asocio	5,09
S-ro G. Pirlot, Belgujo	0,43
S.P.N., ie en Esperantujo (laŭ eksplicita deziro de la donacinto)	46,80
Stato je la 5a de oktobro 1973	£ 170,13

Al ĉiuj donacintoj tutkoran dankon, speciale al tiuj subtenantoj de CED, kiuj regule, ĉiujare, kontribuas laŭ siaj eblecoj al la laboro de tiu ĉi institucio.

Rapidu aliĝi antaŭ la jarfino

59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 – 08 03

Alta Protektanto: D-ro Klaus von Dohnanyi, Federacia Ministro pri Klerigo kaj Scienco.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Valoras aliĝi antaŭ la fino de 1973!

Nur ĝis la 31a de decembro 1973 validas la kotizoj de la unua periodo. Post tiu dato la aliĝantoj pagos almenaŭ 10% pli, depende de la kategorio. Valoras, do, jam nun decidiĝi por Hamburgo! Jen la tarifo ekde la 1a de januaro 1974:

	gld.
1. Kongresano ne membro individua de UEA . .	107,80
2. Kongresano individua membro kun Jarlibro (MJ).	92,80
3. Kongresano individua membro kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	77,80
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio (1) . . .	75,50
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio (2) aŭ (3) .	65,–
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	31,90
7. Universitata studento ĝis inkluzive 30-jara . .	53,90
8. Blindulo	42,90

Blinduloj kongresos samtempe

En la kadro de la 59a UK (do ne pli frue, kiel en 1973) okazos ankaŭ la 42a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Interesitoj turnu sin al la kompetenta LKK-ano, s-ro Karl-Heinz Hoffmann, D-2000 Hamburg 54, Gemseneck 14.

Ankaŭ KELI kaj IKUE en Hamburgo

Komuna ekumena kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista okazos en la semajno antaŭ la UK, en Hamburg-Langenhorn.

Rektoro de ISU nomita

Kiel Rektoro de la 27a Sesio de la Internacia Somera Universitato, okazonta en la kadro de la Universala Kongreso, funkcios prof. d-ro Helmut Ebinger, fakulo pri geografio, katedra profesoro en la Universitato de Hamburgo kaj membro de Germana Esperanto-Asocio.

Rezervu frue por viaj infanoj!

En la 14a Internacia Infankongreseto estos lokoj por 51 infanoj. Estas tial konsilinde tre frue anonciĝi, petante specialan aliĝilon de la adreso de LKK.

Reklamu per la Dua Bulteno kaj Kongresa Libro

Jam akceptataj estas anonco-mendoj por la Dua Oficiala Bulteno kaj por la Kongresa Libro. En ambaŭ kazoj la prezoj estas samaj: tuta paĝo kostas 100,– g.m., duona paĝo 70,– g.m. kaj kvarona pago 40,– germanajn markojn. La prezoj por anoncoj sur la kovrilaj paĝoj estas la duoblo de la ĵus menciitaj sumoj. Interesitoj petu detalojn kaj mendilon ĉe la Konstanta adreso de la UK.

Reklam-glumarko

Aperis bela 2-kolora glumarko pri la Kongreso. Mendojn akceptas la Libroservo de UEA. La prezo por dekmarka folio estas 0,50 gld. (1 internacia respondkupono); por Nederlando 0,57 gld. Aldoniĝas sendokostoj 10%.

Aŭd-vida propagandilo

La kongresorganizantoj preparis serion da koloraj diapozitivoj kun sonbendo pri la urbo de la 59a UK. Grupoj kaj societoj povas skribi al la adreso de LKK (205 Hamburg 80, Schärstr. 26, FR Germanujo).

Por kolektantoj

La Loka Kongresa Komitato jam presigis belajn dukolorajn kovertojn kun la emblemo de la Kongreso. Ili estos aĉeteblaj kiel "unuatagaj kovertoj" dum la UK.

Statistiko pri la aliĝintoj ĝis la 8a de novembro 1973

Arg. 1, Aŭstral. 1, Aŭstrujo 3, Belg. 5, Braz. 1, Brit. 10, Bulg. 15, Ĉeĥ. 2, Dan. 3, Egipt. 2, Finn. 4, Franc. 9, FR Germ. 30, Grek. 1, Hisp. 5, Hung. 10, Irl. 1, Isr. 1, Ital. 5, Jap. 6, Jug. 32, Kanado 3, Koreujo 1, Madag. 1, Monako 1, Ned. 7, Norv. 2, Nov-Z. 1, Pol. 6, Sudafr. 1, Sved. 10, Svis. 4, Urug. 1, Usono 5, Zairo 1. Entute: 191 aliĝintoj el 35 landoj.

KONKURSOJ POR 1974

UEA denove invitas ĉiujn siajn membrojn kaj membrojn de la 59a Universala Kongreso partopreni la Belartajn Konkursojn. La kompleta, reviziita regularo de la Konkursoj aperis en la broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA", kiun ĉiu individua membro de UEA ricevis senpage. Nepre ĉiuj konkursontoj atente tralegu la regularon, precipe la artikolojn 1 kaj 2.

Kiel en la lastaj jaroj, la ĉijaraj branĉoj estas jenaj: 1. Originala poezio; 2. Tradukita poezio; 3. Originala prozo; 4. Originala drameto (por scenejo aŭ por radio).

Ĉiujn konkursaĵojn kun la aldonaĵoj laŭ la regularo oni sendu al la sekretariino de la Belartaj Konkursoj: **s-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio.** La limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas la 31a de **marto 1974.**

La valoroj de la premioj estas difinitaj jene: por la 1-a premio, 100 gld.; por 2-a premio, 70 gld.; por 3-a premio, 40 gld.; por la premio "Nova Talento", 70 gld. Krome la nomo de la "Nova Talento" estos engravurita sur la pokalo Henry Harabagiu.

Oni aparte petas, ke konkursantoj, kiuj tradukas verkojn de nemulte konataj aŭtoroj, *aldonu al la konkursa traduko koncizajn biografiajn-kritikajn notojn pri la aŭtoro*. Tiujn notojn oni poste utiligos okaze de eventuala publikigo de la traduko.

LETEROJ DE LEGANTOJ



HELPU IUN LERNI!

Skribas Robert Kvašňák (FR Germanujo):

Post la legado de via artikolo (*Esperanto,* julio-aŭgusto, p. 121) al mi venis ideo por la malpezigo de via grandega ŝarĝo labora ĉe UEA. Anstataŭ esti la ĉiama peranto de helpo al novaj lernantoj en la landoj sen organizita Esperanto-movado aŭ sen instrurimedoj, UEA povus provi alian vojon. Samkiel oni jam havas tiel nomatajn adoptajn gepatrojn, kiuj sendas monon por infanoj en Vjetnamujo aŭ en aliaj landoj — kaj samkiel oni havas sistemon de "ĝemelurboj", UEA povus starigi sistemon de ĝemeliĝintaj grupoj aŭ unuopuloj.

Oni povus regule publikigi en *Esperanto* liston (sen adresoj) de helpotaj grupoj aŭ unuopuloj en tiaj landoj. Grupo aŭ unuopulo, kiu volus helpi aŭ per mono aŭ per libroj, varbmaterialo ktp., skribus rekte al UEA, de kiu tiu ricevus la adreson de la helpoto. Post tio la Centra Oficejo ne plu havus la laboron, sed la helpo estus daŭra.

Reciproke la helpatoj havus la eblecon helpi la helpantojn. Per poŝtmarkoj, poŝtkartoj aŭ aliaj objektoj ili povus, unuflanke, helpi veki intereson en la lando de la helpanto. Aliflanke ekzistus jam la firma bazo por leterinterŝanĝo kaj estontaj vizitoj.

Respondas la redakcio:

La ideo ŝajnas elprovinda. Ĉi-sube ni eksperimente aperigas liston de personoj, kiuj petis helpon por lerni Esperanton. En parentezoj post la nomoj ni indikas la lingvo(j)n, en kiu(j) oni povas alskribi ilin. Se estas indikita nur nacia lingvo, tio signifas, ke la nomita persono ankoraŭ ne aŭ nur apenaŭ komencis lerni Esperanton. Se estas menciita ankaŭ Esperanto, tio signifas, ke la nomito jam komprenas tiun lingvon sed bezonas helpon por pli bone lerni ĝin. Grupoj aŭ unuopuloj, kiuj volus ligi kontakton kun ili, petu la adresojn pere de la Centra Oficejo, menciante la numeron de la persono elektita.

1. Fatmir Vasjari, Albanujo (albane, Esperante).
2. Juan Môas Madrigal, Kubo (hispane).
3. Frank Cruz Duarte, Kubo (hispane).
4. Lázaro Piedrahita Ramírez, Kolombio (hispane).
5. Şerif Antepli, Turkujo (turke, angle).
6. Rafael Martinez R., Ĉilio (hispane, Esperante).
7. José A. Alvarez, Kubo (hispane).
8. Antonio Jofre, Kubo (hispane).
9. Eladia Ravel, Kubo (hispane).

VALORA PROPONO

Skribas Charles R.L. Power (Usono):

Preskaŭ ĉiu grava internacia organizaĵo havas unu solan nomon: Ruĝa Kruco, Amnestio Internacia, Asocio por Unuiĝintaj Nacioj, ktp. La landaj, regionaj kaj urbaj filioj de tiuj organizaĵoj portas la saman nomon. Kial nia movado ne agas tiel? Tio donus avantaĝojn en la lokaj eksteraj rilatoj. Ekzemple: Kiu pli efike invitus ĵurnalistojn al gazetara konferenco — ĉu la sekretario de la Esperanto-Klubo de Bervalo aŭ tiu de la Bervala Filio de Universala Esperanto-Asocio? Temas nur pri vortoj, komprenebles, sed en la eksteraj rilatoj necesas rekoni la valoron de la vortoj.

Respondas la redakcio:

La kaŭzoj estas historiaj: malsame kiel la aliaj menciitaj organizaĵoj, la landaj kaj lokaj organizaĵoj de la Esperanto-movado ekestis pli frue, ol la internaciaj. Efektive, nuntempe almenaŭ unu el la aliĝintaj landaj asocioj de UEA intencas uzi la nomon "Universala Esperanto-Asocio — landa sekcio por .....ujo". Lokaj societoj filiiĝintaj al unu el la aliĝintaj landaj asocioj de UEA povus imiti tiun ekzemplon.

DANK'AL FAKDELEGITO

Skribas J. Catling (Britujo):

Antaŭnelonge oni invitis min viziti F.R. Germanujon por ĉeesti financajn diskutojn en konekso kun mia profesio. Mi deziris tuj informiĝi pri la situacio rilate al impostoj ktp., antaŭ ol mi iris, kaj do skribis al la delegito kaj samtempe fakdelegito komerca en Akeno, s-ro Adam Uebags, kun peto, ke li sendu al mi informbroŝurojn pri tiuj temoj. Samtempe mi skribis al tri aliaj instancoj ne-Esperantaj, nome du bankoj kaj iu organizaĵo por rilatoj inter F.R. Germanujo kaj aliaj landoj.

S-ro Uebags sendis al mi preskaŭ tuj tre ampleksan informon, kiu multe helpis al mi en la preparo por mia vizito. De la aliaj instancoj mi ricevis absolute nenion. Do, mi povas diri, ke sen la helpo de la delegito mi estus havinta grandajn malfacilaĵojn por prepari ĉion, kion mi bezonis.

NEKROLOGO

CHANNING BETE (1908-1973)

Channing L. Bete, patro, fondinto de la eldonejo Bete, mortis en Massachusetts, Usono, la 18an de aŭgusto. Lia eldonfirmo produktis milionojn da klerigaj kaj informaj broŝuroj en la stilo, kiun li nomis "skriptografio" — okulfrapa kombino de amuzaj, simpligitaj desegnaĵoj kun manskribita teksto. Li estis konata kiel aktivulo sur la kampo de socia plibonigo, kaj lian aktivan subtenon al la Internacia Lingvo atestas la eldono de du informbroŝuroj kaj moderna kursmaterialo *(A first course in Esperanto,* de William Auld), por kies lanĉo li speciale flugis al la Universala Kongreso en Portland.

REORGANIZI LA GAZETARAN SERVON

Prikongresaj reeĥoj

Almenaŭ unuavide, ne estus aparte malfacila tasko refuti nian aserton en la septembra numero (kiam ni promesis reveni al ĉi tiu temo), ke "la ĝenerala reeĥo de la Kongreso .... estis tute minora." Nun, kiam antaŭ ni staras eĉ nur parto de la artikoloj kaj notoj prikongresaj, eblas konstati, ke al la 58a UK en Beograd estis dediĉita plurdeko, eble eĉ tuta cento da artikoloj kaj prinotoj, aperintaj dise tra la mondo, en gazetoj jen kun miliona eldonkvanto, jen de preskaŭ vilaĝa signifo. Aldone venas ankaŭ plurdeko da mencioj en radio-programoj (eĉ kelkaj ampleksaj intervjuoj) kaj pluraj penetroj en la televidajn programojn de la kongreslando. Ĉio ĉi certe ne estas preteratentebla, kaj ĝi almenaŭ nombre sugestas kontentecon. Tamen, se oni taksocele relegas ĉiujn tiujn informojn, artikolojn, notojn kaj intervjuojn, — la unuavida kontenteco montriĝas ŝajna kaj minacas eĉ malaperi.

Kompreneble, ni ne rajtas jubile jodli pro la fakto, ke preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj de Jugoslavio, ĉiuj radiostacioj kaj ĉiuj televidaj programoj de la lando aperigis informon aŭ disaŭdigis novaĵon pri la kongresa inaŭguro. Ili ja ne nepre faris tion pro aparta simpatiemo al la Internacia Lingvo, sed pro la fakto, ke okazis io nekutima, kio meritis prinoton, des pli ke tion partoprenis preskaŭ du mil homoj, inter kiuj pluraj eminentuloj de la enlandaj socia kaj politika vivoj. Cetere, tiel amase estas hodiaŭ represataj kaj disaŭdigataj ankaŭ informoj pri ĉiu pli grava aŭtomobila akcidento, pri ĉiu murdo aŭ prirabo.

Krome, kun kelkaj esceptoj, ĉiuj ĉi artikoloj, artikoletoj, informoj kaj intervjuoj raportas pri la inaŭguro, poste kvazaŭ atendas ĝis la fino de la semajno kaj anoncas, ke la Kongreso finiĝis. Preskaŭ ne ekzistas artikoloj aŭ informoj pri la kongresaj sesioj, eĉ ne pri la ĉi-jara kongresa ĉeftemo — lingva egalrajteco, kiu ja estis amplekse, kompetente kaj eĉ interese traktita en la Dua Ĝenerala Kunveno. Nenie aperis mencio pri la prelegoj de ISU, kulturaj aranĝoj, Belartaj aŭ Oratora Konkursoj, kunvenoj de la fakaj organizaĵoj, organizaj diskutoj ktp. Anstataŭ tio, svarmis artikoloj pri geedzaj paroj, kiuj konatiĝis pere de la Internacia Lingvo kaj en kies familia vivo ĝi estas eĉ "la lingvo de kvereloj". Ĝuste tiaj ĉi artikoloj estis la plej ampleksaj kaj aperis en pleje legataj gazetoj. Per si mem tio ja estas nenio malbona, kaj oni povus ĝoji, ke la beograda LKK kaj ĝia gazetara fako sukcesis penetri en tiajn mediojn.

Tamen, tiuj, kies tasko en Beograd estis prizorgi la gazetaran fakon, meritis la plej flatajn komplimentojn pro la artikolo de Raša Popov, aperinta dum la postkongresa semajno en la plej renoma jugoslavia ĵurnalo "Politika". La aŭtoro, kiu cetere estas signifa nomo en la jugoslavia kultura vivo, en la artikolo "Diferencas sole la litero L" traktas la al ni konatan, senprecedencan fenomenon de la "funkciado" de la Internacia Lingvo. La fakton, ke oni "kun membroj de kvindek nacioj konversacias sammaniere, sub la samaj kondiĉoj", Raša Popov trovas "unika antropologia laboratorio". Mallonge dirite, tiu artikolo en "Politika" ŝajnas esti unu el la plej favoraj artikoloj, kiuj dum la lastaj jardekoj aperis en Jugoslavio lige al la Internacia Lingvo kaj al nia Movado. Sufiĉe mala, ĉar malica, estis longa kontribuaĵo, kiun en sia numero de la 5a de aŭgusto aperigis NIN, tre influa semajna gazeto. Al atenta leganto, la malicaĵoj impresas bumerange, irante al la konto de la aŭtoro (cetere nesufiĉe kuraĝa por indiki sian nomon), kaj ne al tiu de la Internacia Lingvo. En sia sekvanta numero NIN aperigis demandon de leganto — pro kio tiel neserioza komento ricevis spacon en tiel serioza revuo. Se ni diras, ke tiu komento aperis en NIN pro la fakto, ke la kontraŭuloj de la Internacia Lingvo estis pli aktivaj ol ni, ĝiaj adeptoj — ni venis al la kerna punkto, al tio, kio nin instigis okupiĝi pri la kongresaj reeĥoj.

Ne temas nur pri la Beograda Kongreso, temas samtiel pri la Londona, Viena, temas pri plejmulto el niaj lastatempaj kongresoj kaj aranĝoj, en kies kadro funkcias gazetaraj fakoj kaj servoj. Ĉe ĉiuj lastatempaj kongresoj, la Gazetara Servo apartenis al la plej diletantisme organizitaj fakoj, ĝi estis neta improvizaĵo. Konsiderante la fakton, ke ankaŭ la investoj el la kongresa kaso tiucele estas ne sufiĉaj, — oni verŝajne eĉ ne povas atendi pli bonajn rezultojn. Estus maljuste kulpigi tiujn kelkajn entuziasmulojn, kiuj de jaro al jaro efektive laboregas en la kadro de la Kongresa Gazetara Servo kaj kun siaj limigitaj fizikaj kaj fakaj kapabloj apenaŭ povas atingi pli bonajn rezultojn. Necesas, ke la organizantoj de la kongresoj rekonsideru sian tutan politikon rilate la funkciigon de la informaj fakoj dum la kongresoj.



Estus pli normale, ke oni unue prizorgu fake gvidatan kaj bone funkciantan Gazetaran Servon, kaj nur poste pensu el kiaj programeroj kunmeti la "Varian Vesperon" kaj kion mendi por la bankeda tablo de la kongreso. Se oni volas, ke niaj kongresoj vere havu manifestacian kaj popularigan karakteron rilate al la ekstera publiko, necesas kompreni, ke tiurilate la ĝusta vojo iras multe pli tra bone organizita gazetara fako ol eĉ tra brile kantita opereta ario.

S. Milojević

TRIA BAZA LABORPLANO DE UEA

Akceptita de la Komitato en Beograd, 1973

Per 30 voĉoj kontraŭ 3 (kun 9 sindetenoj) la Komitato de Universala Esperanto-Asocio, en siaj kunsidoj dum la Universala Kongreso en Beograd, la 3an de aŭgusto 1973, akceptis la ĉi-sube presitan novan Trian Laborplanon de UEA. La nova Laborplano baziĝis sur la Dua Laborplano, kiu validis de 1962 ĝis 1973. Komisiono elektita en la Universala Kongreso en Londono (1971) preparis la novan tekston, kaj komisiono de la Komitato plue amendis ĝin en Beograd. Por evidentigi al la membroj la diferencojn inter la Dua kaj la Tria Laborplanoj, ni ĉi tie presigas per *kursivaj* literoj ĉiujn *novajn* tekstopartojn.

I. ENKONDUKO

1. **Laborplano 1955-1962:** La konataj decidoj de UNESCO fine de 1954 necesigis sistemigon de la laboro de UEA kaj de ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi. Tiucele estis ellaborita la 1-a Baza Laborplano de UEA, kiu ebligis celtrafan agadon en la periodo 1955-1962.

2. **Laborplano 1962-1973:** *En 1962 la komitato akceptis en Kopenhago la 2-an Bazan Laborplanon de UEA. En la kadroj de tiu plano okazis kvazaŭ saltaj progresoj sur preskaŭ ĉiuj vere gravaj kampoj, kio konfirmas la ĝustecon de ĝiaj premisoj.*

Dank'al la du laborplanoj kaj la okazaj planoj (ekzemple okaze de la kampanjo de UNESKO, Zamenhof-jaro, la peticio en 1965-66 por UN ktp.) UEA evoluis el tre malfacila situacio rilate la nombron de membroj, financan bazon kaj reputacion, al unu el la plej fortaj kaj prestiĝaj neregistaraj organizaĵoj el ĉ. 3000 en la tuta mondo. La nombro de aliĝintaj landaj asocioj, membraro, fakaj organizaĵoj ktp. duobliĝis aŭ pli ol duobliĝis dum la asocia kapitalo 10-obliĝis dum la lastaj 25 jaroj.

Entute la movado nun troviĝas sur multe pli alta nivelo ol antaŭe. Dank'al valoraj agadoj sur la kampo de informado konsiderinde kreskis la kompreno pri efika informado kaj kreiĝis multe pli racia sinteno al la ekstera mondo. Responde multiĝis kontaktoj kun politikaj kaj universitataj instancoj, kaj tie estas kreita multe pli da atento pri Esperanto. En tiuj medioj kreskis ankaŭ konkretaj aktivecoj kiel ekzemple divers-specaj parlamentaj agadoj, universitata instruado de Esperanto kaj eldonado de la altnivela revuo "La Monda Lingvo-Problemo". Krom tio progresis kulturaj agadoj, praktikaj servoj kaj aliaj aktivecoj.

La instrumento por la laborado por la solvo de la monda lingvo-problemo, la organizitaj UEA kaj apartenantaj organizaĵoj estas nun senkompare multe pli forta kaj efika ol iam ajn antaŭe, kaj tio en si mem motivigas revizion, ĝisdatigon kaj ampleksigon de la laborplano en jenan 3-an laborplanon.

II. CELO

3. **Premisoj:** *Estas klare ke depost akcepto de la 2-a laborplano en 1962 la monda lingvoproblemo konsiderinde pligraviĝis, tiel ke responde forte kreskis la bezono pri definitiva rimedo de komunikado por ĉiuj internaciaj rilatoj.* Estas same klare, ke tiun bezonon povas plene kontentigi nek unu aŭ pluraj naciaj lingvoj, nek la nuntempaj sistemoj de tradukado kaj interpretado, nek la plej modernaj tradukmaŝinoj, sed sole vivanta, ĝis maksimumo nuancita, plensanga kultura lingvo. Bazante sin sur tiuj du premisoj kaj konante perfekte la nunan evolustadion de la Internacia Lingvo kaj ĝiajn senfinajn evolu-eblecojn, la organizita Esperanto-Movado estas konvinkita, ke precize la Internacia Lingvo prezentas la solvon de la lingva problemo en mondaj kadroj kaj ke tial pli aŭ malpli frue devas veni la tempo kiam ĝi estos aplikata en ĉiuj internaciaj rilatoj, sur ĉiuj niveloj.

4. **Baza laborpolitiko:** *Estas evidente, ke mondampleksa aro da uzantoj de la lingvo estas kaj kreskas kaj restas la sola nerompebla bazo de ĝia ekzistado kaj iom-post-ioma ĝeneraliĝo.*

Neniu faktoro, ĉu politika apogo, ĉu universitata intereso, ĉu mona subteno aŭ alia forto povos iam ajn anstataŭigi tiun bazon. Ĝi superas ĉion, kaj unueca movado, kiu kapablas labori racie kaj laŭplane kaj kun la necesa memdisciplino, povas kun certeco konduki la lingvon al la celo. Sed sen la influo de la menciitaj faktoroj kiel mona subteno, universitata lingvista intereso, politika apogo ktp. la altira povo de la movado estas tro mal-granda kaj la progresoj okazos multe tro malrapide. En sisteme realigata plano tiuj faktoroj, kaj ankaŭ aliaj kiel praktikaj servoj, kulturaj agadoj kaj faka literaturo ktp., povas laŭ decida grado kontribui al fortigo de ĉiuj aliaj flankoj de la aktivecoj, i.a. al kreado de ĝenerala fido al la opinio, ke laŭ lingva, politika kaj praktika vidpunktoj Esperanto estas absolute realisma afero, kiu pli-malpli frue nepre realiĝos. Sendube la jam atingita stato certigas estontan ĝeneraligon de la lingvo, sed la tasko estas realigi ĝin kiel eble plej frue en ĉi tiu jarcento.

5. **Organizita agado:** Rezulte, necesas, unuflanke, daŭre evoluigadi la Internacian Lingvon rigore konservante kaj fortikigante la lingvounuecon, por ke en ĉiu momento ĝi povu kontentigi ĉiujn bezonojn de internacia komunikado, kaj, aliflanke, konscie, organizite kaj paralele vastigi la scion kaj la praktikajn aplikojn de la lingvo en ĉiuj sferoj. Malfacile oni povas antaŭvidi kiam precize la utiligo de la Internacia Lingvo ĝeneraliĝos, ĉar tio dependas de multaj faktoroj, el kiuj la plej granda parto troviĝas tute ekster la atingopovo de la Esperanto-Movado, sed tutcerte la kondiĉoj por tio ĉiam pli maturiĝos. Tial estas eble almenaŭ ĝis certa grado influi la solvon kaj plirapidigi la procezon per konsiderinda altigo de la nombro de personoj mastrantaj la lingvon, kio aŭtomate vastigas la kampon de ĉia-specaj praktikaj aplikoj kaj, krome, ebligas ankaŭ konscian vastigon de tiuj praktikaj utiligoj. Siavice tio devas plimultigi kaj fortikigi ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, sekve ebligi novajn agadojn kaj intervenojn kun pli da efiko, kio ne povas ne reflektiĝi en la plua disvastiĝado de la lingvo. Ĉio ĉi estas firme kunligita, sed estas necesa la elemento de konscie organizita agado por sukcesplene rapidigi la funkciadon de tiu maŝinaro de reciproka influado. La nova Baza Laborplano plenumas tiun taskon. Ĝi prezentas komunan framon por la agado de ĉiuj organoj de UEA, de la aliĝintaj asocioj, de la kunlaborantaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj, de la lokaj societoj kaj unuopaj membroj. Ĝi montras la vojon al la fina celo – la ĝeneraligo de la uzo de Esperanto en la internaciaj rilatoj – la internajn kaj eksterajn taskojn plenumendajn en la nuna stadio, kaj labor-metodojn aplikendajn por efike proksimiĝi al tiu celo.

III. INTERNAJ TASKOJ

A. UEA

6. **Organiza plifortigo:** (a) Instigi al aliĝo al UEA ĉiujn landajn kaj fakajn asociojn; (b) *1.* plifortigi la landajn kaj fakajn asociojn; *2.* iniciati kaj helpi la organizon de novaj *landaj kaj*

fakaj asocioj, laŭeble kun la helpo de ekzistantaj organizaĵoj en najbaraj landoj; (c) konsiderinde altigi la nombron de individuaj membroj, *ekz. per kampanjoj en la LA (landaj asocioj); (ĉ) instigi la LA intense labori por altigi sian membronombron, per tio altiĝas ankaŭ la nombro de asociaj membroj de UEA;* (d) *1.* utiligi la kategoriojn "apogantoj" kaj "apogantaj organizaĵoj" por havigi al UEA la subtenon de simpatiantaj organizaĵoj; *altigi la nombron de* unuopaj apogantoj; *2. iniciati la kategorion "interesitoj" (pri la internacia lingvoproblemo), kiuj 2-5 fojojn jare ricevu diversspecan informan materialon, por kio ili pagu proksimume la kostojn. (Tiu aktiveco okazu en la kadro de la LA cele al informado kaj kreado de interesiĝo pri pli proksima rilato al Esperanto.);* (e) fortigi *la junularan organizaĵon* kaj doni al ĝi efikan helpon en la disvastigo de la Internacia Lingvo en la junularo; *celi en tiu starigon de landaj kaj lokaj sekcioj paralelaj al la LA kaj LS kaj en plej eble intima kunlaboro kun tiu;* (f) *1. grandigi* la nombron de delegitoj kaj *fakdelegitoj kaj instigi ilin al pli efika kaj pli ampleksa aktivado; 2. laŭeble redukti la kostojn de la delegita reto per redukto de la kostoj de la Jarlibro;* (g) nepre *atingi pli grandan entuziasmon pri la komunaj taskoj kaj sekve de tio* atingi pli fortan internan disciplinon, tiel ke ĉiu organo, funkciulo aŭ oficisto de la Asocio plenumu precize, akurate kaj ĝustatempe siajn taskojn kaj devojn kaj ke, aliflanke, laŭ la dezirindeco, la unuopaj lokaj grupoj kaj individuaj membroj turnu sin unuavice al siaj respektivaj landaj aŭ fakaj asocioj, komitatanoj kaj lokaj organizaĵoj, senŝarĝante tiamaniere la centrajn organojn de laboroj, kiuj apartenas al la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj aŭ lokaj *societoj; (ĝ) ordigi kaj daŭre kompletigadi la bibliotekon, tiel ke ĝi estu maksimume ĝisdata; (h) distingi klare inter la bezonoj de* uzantoj *kaj* agantoj *en la movado* (Uzantoj *estas tiuj, kiuj simple uzas la lingvon por personaj celoj; la samon faras la* agantoj, *sed krome tiuj partoprenas aktive la internan organizan laboron aŭ la aktivecojn direktitajn al la ekstera mondo.); profunde analizi la bezonojn de tiuj 2 kategorioj kaj poste eltiri la konsekvencojn en la laborplano, organizado, informado ktp.; (ĥ) instigi al kiel eble plej altgrada profesiigo de la laboroj ĉie en la movado; esplori kaj analizi kaj informi pri metodoj kaj eblecoj, kiujn oni trovos; (i) instigi neesperantajn fakajn organizaĵojn (ekz. politikajn, religiajn kaj socialajn, komercajn, industriajn, turismajn ktp.) labori per kaj por Esperanto – per starigo de Esperanto-sekcioj en la diversaj landoj, kiuj laboru ĉefe por la propraj celoj; (j) apogi kaj utiligi aktivecojn, kiujn realigas aliaj ekster la kadroj de UEA aŭ la koncernaj LA; (ĵ) aparte apogi ILEI rilate ĝiajn klopodojn en lernejoj kaj, se eble, rilate fondon de lernejaj Esperanto-rondoj; (k) iniciati renkontiĝojn kun diskutoj kaj interparoloj inter funkciuloj de la LA cele al interŝanĝado de spertoj kaj vidpunktoj, ekz. en kunligo kun la UK.*

7. **Informado:** (a) Intensigi la agadon surbaze de la Principaro de Frostavallen (vidu la broŝuron "Statuto kaj Regularoj", p. 58), kiu formas konsistan parton de tiu ĉi laborplano; (b) 1. dediĉi precipan atenton al agado en Azio, Afriko kaj *Suda Ameriko* (specialaj broŝuroj, prelegoj, havigo de instruistoj, lernolibroj, fondo de grupoj kaj landaj asocioj, *laŭeble kontaktoj kun studentoj);* 2. instigi la LA de la industrilandoj kun evolulandaj studentoj, fari specialajn aranĝojn por interesi kaj instrui ilin, tiel ke al evolulandoj revenu kaj uzantoj kaj agantoj; (c) instigi la LA kaj LS *(lokaj societoj)* realigi la ideojn kaj sugestojn, kiujn entenas la Principaro de Frostavallen; (ĉ) instigi *kaj organizi* interŝanĝadon de spertoj *inter la LA; tiucele la LA informadu per cirkuleroj la ceterajn LA pri siaj klopodoj kaj konkretaj rezultoj (Vd. III. A. 6. k) almenaŭ en kadro de regionoj;* (d) aranĝi konferencojn de la informaj fakoj kaj specialistoj pri informado kun la celo daŭre plibonigadi la enhavon kaj metodojn de informado; *(e) konsciigi, ke plej efika informado estas praktikaj demonstroj, ekz. en formo de lerta interpretado de prelegoj kaj diskutoj kaj en formo de esperantlingvaj teatraj kaj filmaj prezentoj; sekve instigi al tiaj aktivecoj ankaŭ pro informaj kaŭzoj; (f) instigi la LA al maksimuma ekspluatado de la eblecoj, kiujn donas ministeriaj informaj fakoj, kulturministerioj, ŝtataj fervojoj k.a., por eldoni esperantlingvajn filmojn, librojn kaj presaĵojn ktp. pagatajn de la koncernaj publikaj kasoj; (g) instigi al "Rekta Informado" fare de LA kaj LS: alsendo de taŭga informa materialo al elektitaj personoj (ministroj, parlamentanoj, universitataj profesoroj, docentoj k.a., ĵurnalistoj, verkistoj, tradukistoj k.a.) 2-5 fojojn jare; (ĝ) instigi al ampleksa aktiveco rilate al "interesitoj" cele al kreado de pli granda kaj forta informiteco en la publiko (Vd. III. A. 6. (d) 2.); (h) traanalizi la informan politikon kaj informan sistemon laŭ jena aŭ plibonigita demandaro: 1. kiujn rezultojn ni deziras atingi? 2. kiujn personojn ni sekve devas informi? 3. pri kio ni devas informi? (Faktoj kaj eventoj?) 4. kiuj personoj devas informi? 5. kiamaniere ili devas informi? a) kiu organiza aparato necesas? (La movado) b) kiu informa materialo estas plej taŭga (Moderna broŝura programo, landa revuo.) c) distribua sistemo kaj financaj rimedoj? (ĥ) instigi al uzado de la rezultoj de la analizado en punkto (h); (i) daŭre funkciigi kaj plibonigi la internacian gazetaran servon; (j) instigi la LA funkciigi landan gazetaran servon bazitan parte sur la internacia gazetara servo, parte sur enlandaj eventoj kaj parte sur aliaj fontoj; (ĵ) daŭre funkciigi la eltondaĵan servon; (k) instigi al ampleksa agado per informaj prelegoj kaj diskutoj k.s. en naci-lingvaj rondoj kaj unuiĝoj ("neŭtralaj" kiel ankaŭ ideologiaj (Vd. III. A. 6. (d) 2.); (l) ellabori ampleksan altnivelan informbroŝuran programon laŭ tia sistemo, ke ŝtupon post ŝtupo la diversnivelaj LA povu uzi ĝin; uzi en tiu laboro altkvalitajn profesiulojn pri aranĝo kaj ellaboro de tekstoj; (m) instigi la LA uzi informbroŝuran programon laŭ punkto (l).*

8. **Lingvo:** (a) Rigore konservi kaj fortikigi la lingvounuecon surbaze de la Zamenhofa Fundamento klare distingante inter la necesa aŭ utila evoluigo de Esperanto kaj la danĝera deformado de ĝiaj bazaj strukturaj trajtoj laŭ la Fundamento; (b) atenti, ke ĉiuj publikaĵoj de UEA estu absolute senriproĉaj el lingva vidpunkto; (c) kritike rilati al ĉio, kio malaltigas la lingvan nivelon; (ĉ) konservi kaj konscie intensigi la vivantecon de la lingvo per instigoj al uzado de Esperanto ne nur okaze de internaciaj renkontiĝoj, sed en ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, iliaj organoj kaj inter unuopuloj; (d) ankoraŭ plibonigi la nivelon de la lingvoinstruado per organizo de internaciaj kursoj por kursgvidantoj; kontrolado de lernolibroj kaj rigora kritiko de lernolibroj kaj vortaroj, kiuj deformas la lingvon; publikigado de lernolibroj por lingvoj, en kiuj ili ankoraŭ ne ekzistas; kunligado de lernejoj en kiuj la Internacia Lingvo estas instruata; instigado al organizo de konversaciaj kursoj; aligado de la kursfinintoj al Esperanto-organizaĵoj, inkluzive UEA; plua evoluigo de la internaciaj ekzamenoj *kiel grava faktoro en konservo de la lingva unueco;* instigado al diplomiĝo.

9. **CED:** Nepre konservi kaj fortikigi CED kiel specialan sciencan-esploran institucion de la Esperanto-Movado.

10. **Kongresoj kaj konferencoj:** (a) Plue evoluigi la UK konservante la nunan bazan strukturon, tiel ke ili fariĝu ĉiam pli atentataj mondaj kulturaj manifestacioj; (b) *1.* ligi al UK specialajn aranĝojn, ekz. artajn festivalojn, konferencojn de sciencistoj, teknikistoj *k.a.*, kiam ajn la cirkonstancoj tion permesas; *2. doni al ideologiaj movadoj lokon en UK por ekspoziciaj budoj, prelegoj, diskutoj kaj aliaj renkontiĝoj en kadroj kaj sub kondiĉoj, kiuj konservas la neŭtralecon de UEA (Tio povas okazi ekz. per egalpeza reprezentiĝo de diversvidpunktaj movadoj.);* (c) organizi aŭ helpi la organizon de kiel eble plej multaj internaciaj konferencoj de specialistoj, seminarioj, diskutrondoj kaj similaj aranĝoj, en kiuj estas traktataj internacie interesaj problemoj, kaj utiligo de tiaj aranĝoj ankaŭ por informado en neesperantistaj fakaj medioj; (ĉ) rekomendi, kuraĝigi, aŭspicii *kaj laŭeble helpi morale kaj finance* internaciajn renkontiĝojn kun kultura programo ekster la loko kaj tempo de UK; *(d) laŭeble aranĝi en kunligo kun kongresoj kaj konferencoj publikajn plurnaciajn diskutojn aŭ diskutojn kun difinitaj rondoj, kaj kun aplikado de Esperanto por interpretado; (e) disdoni en internaciaj kongresoj taŭgan informan materialon, aŭ alimaniere informi ilin pri la internacia lingvoproblemo kaj ĝia solvo.*

11. **Publikaĵoj:** (a) 1. Ampleksigi kaj paralele plibonigi la revuon "Esperanto"; *2. fiksi kaj realigi redaktan linion surbaze de esploroj pri bezonoj de "uzantoj" kaj "apogantoj" (Vd. III.A.6.h); 3. eventuale eldonadi apartajn presaĵojn direktitajn al "agantoj" cele al kovrado de ties specialaj bezonoj (Vd. III. A. 6. h);* (b) daŭrigi la eldonadon de la Jarlibro en du partoj kaj ampleksigi ĝin paralele kun la nombrokresko de individuaj membroj kaj delegitoj; *(c) 1. laŭeble eldoni popularan, ĝenerale kulturan kaj vivan revuon, kiu povu interesi grandan parton de la Esperanto-publiko; 2. laŭeble eldoni* altnivelan kulturan revuon;(ĉ) daŭrigi la eldonadon de fakvortaroj, sed pli atenti al la kvalito; *instigi al pli ampleksa agado sur tiu kampo;* (d) 1. instigi eldonadon de antologioj de diversaj naciaj literaturoj en Esperanta traduko, aŭ mem eldoni tiajn; *2. instigi eldonadon el la modernaj popularaj naciaj literaturoj; 3. instigi al realigado de (d) 1. kaj de (d) 2. surbaze de naciaj publikaj kasoj, kiuj ofte estas pretaj pagi ne malgrandan parton de tiaj kostoj;* (e) daŭrigi la serion "Oriento – Okcidento"; (f) *1.* eldonadi aliajn elstarajn tradukojn aŭ originalajn verkojn; *2.* morale apogi ĉiujn eldonistojn, kiuj publikigas valorajn verkojn en la Internacia Lingvo, precipe teknikajn, fakajn kaj popularsciencajn legaĵojn; *(g) instigi al ebla eldonado (plurfoje jare) de*

nacilingva informa revuo, kiu estu redaktata tiel, ke laŭeble ĝi evitu aspekton de propagandilo (Vd. III. A. 7. l); (ĝ) eldoni, se iel eble, 1-jaran ilustritan kaj detalan katalogon pri praktike ĉiuj Esperanto-arangoj, tiel ke per ĝi estu eblaj raciaj vastaj reklamado kaj orientiĝo. Senpaga por individuaj membroj de UEA kaj por unuopaj petantoj. LA pagu iom moderan prezon por ekzempleroj por senpaga distribuo al kursanoj kaj LS; (h) fari la revuon "La Monda Lingvo-Problemo" konstanta eldonaĵo; (ĥ) instigi al vasta reklamado pri la "Esperanto-libro" per landaj kaj lokaj libro-servoj, libroj en publikaj librovendejoj kaj lokaj bibliotekoj ktp.; (i) instigi LA starigi abonan servon, kiu reklamu kaj peru ĉiuspecajn abonojn de internaciaj, landaj, fakaj kaj alispecaj revuoj.

12. **Specialaj kulturaj agadoj**: (a) Daŭrigi ISU kaj, se iel eble, organizi almenaŭ de tempo al tempo memstarajn sesiojn ekster la UK; (b) daŭrigi kaj plibonigi la belartajn kaj oratorajn konkursojn; (c) instigi precipe la lokajn societojn utiligi pli vaste la magnetofonan servon; (ĉ) vastigi la korespondan servon kaj ligi ĝin al aliaj organizaĵoj, kiuj prizorgas internacian korespondadon, tiel ke Esperanto fariĝu unu el la korespondaj lingvoj uzataj ankaŭ ekster la Esperanto-Movado; (d) 1. nepre plibonigi la filman servon kaj kuraĝigi la produktadon de *profesinivelaj* filmoj en Esperanto; *2. instigi la LA klopodi ĉe la enlandaj informaj fakoj (ministerio de turismo, kulturo aŭ eksterlandaj aferoj) pri eldonoj de jam ekzistantaj informaj kaj kulturaj filmoj ankaŭ en Esperanto;* (e) helpi la vastigon de la uzo de Esperanto en radio, *televido* kaj en eldonado de diskoj kaj de sonbendoj kun diapozitivoj, (f) instigi la utiligon de Esperanto por resumoj de libroj, studoj kaj artikoloj, precipe kun scienca kaj faka karaktero; (g) kuraĝigi la uzon de Esperanto en komerco, trafiko *kaj aliaj specoj de profesia vivo; (ĝ) 1. starigi kaj daŭre funkciigi internacian servon por* organizi Esperantlingvajn prelegvojaĝojn de kompetentaj prelegantoj; *2. instigi LA, FO (fakaj organizaĵoj) kaj LS uzi tiun servon, kaj en propra medio kaj en nacilingvaj rondoj kun interpretado en Esperanton, ekz. en universitatoj fare de kompetentaj fakuloj;* (h) utiligi ĉiujn eblecojn por vastigi la uzon de Esperanto en la medioj de scienco, edukado kaj kulturo; (ĥ) plue *instigi kaj* apogi la agadon de *teatraj trupoj en Esperanto; (i) starigi internacian servon kun la celo krei reton de organizantoj por arangi teatrajn turneojn al neesperantista kaj esperantista publikoj; doni per tio al la jam aktivantaj pupaj teatroj pli grandan laborkampon kaj vastigi la agadon en tiu medio.*

B. Landaj Asocioj, Lokaj Societoj, Fakaj Organizaĵoj

13. **Landaj Asocioj**: Konforme al tiu ĉi Baza Laborplano, prenante en konsideron la landajn cirkonstancojn kaj eblecojn, ĉiu Landa Asocio ellaboru propran konkretan programon kun aparta konsidero de jenaj taskoj: (a) organize plifortigi la Landan Asocion, altirante al ĝi *novajn membrojn (uzantojn kaj agantojn), simpatiantojn, apogantojn kaj interesitojn (Vd. III. A. 6. (d) 2.); se ne eblas aktivigi, oni laŭeble transigu la multnombrajn malnovajn esperantistojn ekster la organizaĵoj al ia pasiva membreco aŭ al la kategorio "interesitoj"; en kunligo kun la plifortiga aktiveco oni informu i.a. ankaŭ pri la laborplano de UEA kaj de la koncerna LA kaj pri la lastaj rezultoj atingitaj de nia movado;* (b) aliĝi senprokraste al UEA, se la koncerna LA ankoraŭ ne estas aliĝinta asocio; (c) en kunlaboro kun la Ĉefdelegito, se tia ekzistas, varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn de UEA; (ĉ) instigi la individuajn membrojn de UEA fariĝi Delegitoj, Vicdelegitoj kaj Fakdelegitoj, precipe por la plej gravaj fakoj rilatantaj al scienco, edukado kaj kulturo; (d) organizi aŭ helpi organizon de LA en najbaraj landoj, en kiuj ankoraŭ ne ekzistas LA; (e) formi junularajn sekciojn kaj altiri la plej kapablajn gejunulojn en la gvidajn organojn de la LA; (f) helpi la ekzistantajn lokajn grupojn kaj fondi novajn; (g) formi Informan Fakon, se tia ankoraŭ ne ekzistas, laŭ la Principaro de Frostavallen kun aparta atento al disvastigo de la Internacia Lingvo en la universitatoj, lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo; (ĝ) organizi tutlandajn korespondajn kursojn, radio-kursojn kaj kursojn en nacilingvaj gazetoj; (h) uzi ĉiam la Internacian Lingvon ne nur en kongresoj, konferencoj, kunsidoj kaj kunvenoj, sed ankaŭ ekster la oficialaj arangoj inter esperantistoj; (ĥ) *eldoni profesinivelan landan revuon parte bazitan sur kunlaboro kun elstaraj nacilingvaj verkistoj kaj furnalistoj;* por *pli interna* agado inter neesperantistoj oni eventuale eldonu nacilingvan *revuon;* (i) helpi ĉiurilate la centrajn organojn de UEA en la realigo de la Baza Laborplano; *(j) laŭeble ĉiu evoluinta LA adoptu LA, kiu troviĝas en formiĝo, kaj en ĉiu ebla maniero ĝi helpu en tiu formiĝo kaj en la plua evoluo; (ĵ) starigi, se necese kaj utile, regionajn organizaĵojn, en kies kadroj funkciu la koncernaj LS; (k) organizi kaj instigi la LA por partopreni en "Semajno de Internacia Amikeco".*

14. **Lokaj societoj**: Konforme al tiu ĉi Baza Laborplano kaj la Laborplano de la LA, se ĝi ekzistas, ĉiu Loka Societo ellaboru propran konkretan laborplanon kun aparta konsidero de jenaj taskoj: (a) organiza plifortigo de la societo; speciala kampanjo por *aligi novajn membrojn, i.a. per daŭra senpersvada kontakto kun kursanoj, se eble ankaŭ post la fino de la kursoj. Pri "malnovaj esperantistoj" vidu III.B.13 a;* (b) se iel eble havigi propran ejon kaj, en ĉiu okazo, propran bibliotekon, aboni la landan organon, la revuon "Esperanto" kaj kelkajn aliajn internaciajn revuojn; (c) starigi daŭran korespondan kontakton kaj laŭeble vizitojn kun konvena nombro da eksterlandaj societoj; (ĉ) organizi junularan sekcion aŭ apartan junularan grupon; (d) formi landan asocion, se ĝi ankoraŭ ne ekzistas; (e) aligi ĉiujn siajn membrojn al la LA kaj varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn por UEA; (f) prizorgi, ke en la loko de la societoj kaj en la apudaj lokoj estu D de UEA, eventuale VD kaj kiel eble plej multaj FD precipe por la plej gravaj fakoj de scienco, edukado kaj kulturo; (g) organizi aŭ helpi la organizon de Loka Societo en la apudaj lokoj; (ĝ) organizi Informan Fakon laŭ la Principaro de Frostavallen kaj aparte atenti la agadon en lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo (en universitataj urboj nepre vastigi la informadon en la universitato); (h) 1. organizi konstantajn kursojn por komencantoj (intensa reklamado antaŭ la kursoj) kaj progresintoj; *2. direkti specialan agadon al eblaj lokaj eksterlandanoj; ili povas fari la lokan vivon speciale interesa kaj alloga, kaj en okazo de reveno al la hejmlando ili povos esti efikaj tie;* (ĥ) membrigi la kursfinintojn al la LS, LA kaj UEA; (i) en pli grandaj urboj formi aŭ sekciojn aŭ novajn societojn (la spertoj montras, ke la granda plimulto de la LS atingas ĝis 60-80 membroj, malofte ĝis 300, kio necesigas la fondon, en tiuj urboj, de novaj sekcioj aŭ societoj ĉu laŭ teritoria kriterio – urba kvartalo – ĉu laŭ profesia aŭ faka: junularo, studentoj, laboristoj, intelektuloj aŭ similaj grupoj; (j) okazigi regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn kaj konsiderinde plibonigi la programojn (prelegoj de la membroj, interŝanĝo de prelegoj kun eksterlandaj grupoj utiligante tiucele ankaŭ la Magnetofonan kaj Filman Servojn de UEA, literaturaj vesperoj; programoj konforme al la kunlaborado de UEA kun Unesko, precipe rilate al la projekto Oriento-Okcidento; amatora teatra trupeto kaj kantĥoro, vivaj gazetoj, lumbildaj prezentadoj, partopreno en la organizo de prelegvojaĝoj, dancvesperoj, amuzoj kaj aliaj distraĵoj, konstanta lingva kritiko kun la celo daŭre altigadi la lingvan nivelon); (ĵ) senescepta kaj senkompromisa uzado nur de la Internacia Lingvo por ĉiuj arangoj de la LS, inkluzive la komitatajn kunsidojn; (k) helpi al la organoj de la LA kaj de UEA realigi la Bazan Laborplanon kaj la Planon de la LA; (l) instigi esperantistojn eniri en diversajn mediojn kie Esperanto povas esti utiligata por internaciaj kontaktoj. Tie disvastigi Esperanton kaj fondi grupojn; *(m) pripensi, diskutigi kaj eksperimenti diversmaniere por evoluigi la lokan vivon al pli altirkapabla formo; gvida celo en tiu esplora laboro devas esti, ke homoj povu praktiki proprajn interesojn pere de Esperanto en la kadroj de la LS, tiel ke ne bezonas esti ilia intereso pri Esperanto, kiu tenas ilin en la LS, sed ke iliaj ceteraj interesoj tenas ilin ĉe Esperanto pro la praktikebleco kaj sekve ankaŭ ĉe la LS.*

15. **Fakaj Organizaĵoj**: Konforme al la Baza Laborplano ĉiu faka kaj specialigita organizaĵo ellaboru sian propran konkretan programon kun aparta konsidero al jenaj taskoj: (a) organize plifortigi la koncernan FO, laŭ la eblecoj krei landajn sekciojn kaj lokajn grupojn se tiaj ankoraŭ ne ekzistas ; (b) aliĝi al UEA laŭ art. 14 de la Statuto, se la koncerna FO plenumas la kondiĉojn; (c) instigi la membrojn aliĝi al UEA kiel individuaj membroj kaj fariĝi FD por siaj respektivaj fakoj; (ĉ) organizi fakajn internaciajn renkontiĝojn ne nur dum la UK sed ankaŭ ekster ili; (d) eldoni presitan fakan revuon aŭ pligrandigi kaj plibonigi ekzistantan, aŭ publikigi almenaŭ multobligitan fakan bultenon; (e) daŭre evoluigadi la fakan terminaron kaj eldoni kiel eble plej kompletan kaj modernan fakan terminaron, eventuale en la kunlaboro kun la centraj organoj de UEA *kaj la koncerna neesperantista faka organizaĵo;* (f) doni helpon al la centraj organoj de UEA en la realigo de tiuj punktoj en la Baza Laborplano, kiuj interesas la koncernan FO.

IV. EKSTERAJ RILATOJ

A. UEA

16. **UNESKO kaj U.N.**: Utiligi ĝis maksimumo la eblecojn de la akirita pozicio (kategorio B) en la konsultaj rilatoj kun

UNESKO por efike kunlabori kun tiu Organizaĵo kaj kun U.K. en ĉiuj aferoj, kiuj interesas la Esperanto-Movadon kaj en kiuj ĝi povas doni realan helpon al la plenumo de diversaj agadoj de UNESKO kaj U.N., tute speciale en la Granda Projekto "Oriento-Okcidento"; en la projekto koncernanta la antaŭenigon inter la junularo de la idealoj de paco, reciproka respektado kaj interkompreniĝo de la popoloj; en la agado en Afriko; disvastigo de la celoj kaj idealoj de UNESKO kaj U.N.; eldonado de klerigaj materialoj de UNESKO en la Internacia Lingvo; aktiva partoprenado en la konferencoj de UNESKO kaj en diversaj kunvenoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj organizitaj de UNESKO kaj U.N.; *kun konvenaj intermitoj la nove akiritaj subskriboj por U.N. estu transdonitaj al la sekretariato de U.N.*

17. **Eŭropaj Institucioj**: Intensigi la klopodojn ĉe ĉiuj eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj por la solvo de la lingva problemo de Eŭropo.

18. **Aliaj Regionaj Organizaĵoj**: Iniciati agadon, ĉiam kun la celo solvi la lingvan problemon, simile al la agado en Eŭropo, ankaŭ ĉe aliaj gravaj interŝtataj regionaj organizaĵoj.

19. **1) Naciaj politikaj instancoj**: *Iniciati kaj instigi agadon en la naciaj parlamentoj kaj registaroj por krei altan nivelon de informiteco kaj interesiĝo (Vd. III. A. 7. g). Uzi tiun bazon por elvoki oficialajn iniciatojn enlande kaj internacie.*

2) Parlamenta agado: *Instigi al grandskala partoprenado en la agado por la propono por U.N., Fari tiun agadon konstanta kampanjo por krei politikan manifestacion utiligeblan en agado en universitatoj kaj rilate al la publiko, rilate al ŝtataj kaj aliaj administraj organoj, kiuj povas subteni finance aŭ mem financi kulturajn aŭ aliajn aktivecojn en Esperanto, kaj ne malpli en laboro por grandigi la eblecojn de instruado en la lernejoj kaj por krei interesiĝon pri interŝtata konvencio pri laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn (Vd. IV. A. 23. b).*

3) Parlamentaj grupoj: *Instigi la LA labori, i.a. surbaze de la subteno al la propono por U.N. por preni iniciaton cele al starigo de grupo de parlamentanoj kun speciala intereso labori diversmaniere por Esperanto.*

4) Naciaj esplorkomisionoj: *Instigi la LA labori por starigo de naciaj esplorkomisionoj, kiuj ĉiu en sia lando profunde esploru kaj oficiale raportu pri la internacia lingvo-problemo kaj ĝia solvo. – La koncerna LA povas instigi al tia laboro, kaj kiel membrojn de la komisiono ĝi mem povas proponi elstarajn personojn, pri kies kompetenteco kaj objektiveco ĝi estas certa. En tia komisiona laboro devas nepre partopreni ankaŭ homoj, kiuj estas tute kompetentaj pri Esperanto.*

20. **Specialigitaj Organizaĵoj**: Daŭre kontaktadi ĉiujn registarajn specialigitajn organizaĵojn kaj atentigadi pri la solvo de la lingva problemo per la Internacia Lingvo (unu el la ĉefaj taskoj de CED).

21. **U.I.A.**: Konservi kaj plifirmigi la rilatojn kun la Unio de Internaciaj Asocioj, liveri al ĝi la necesajn dokumentojn kaj aliajn materialojn pri la Internacia Lingvo, aktive partoprenadi en diversaj laboroj de U.I.A.

22. **Aliaj NRO**: Konservi kaj intensigi la bonajn rilatojn kun ĉiuj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO, precipe kun tiuj de kategorio A kaj B.

23. **Lernejoj**: *Sur ĉi tiu kampo UEA kaj LA kaj LS kunlaboru kiel eble plej intime kaj efike kun ILEI:* (a) daŭrigi la klopodojn vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj; (b) paralele daŭrigi la kampanjon por subskribo de Interŝtata Konvencio pri laŭgrada paralela deviga enkonduko de Esperanto en difinitan nombron da lernejoj de la landoj, kiuj aliĝos al la Konvencio; (c) informadi la Sekretariaton de UNESKO pri la pregresoj sur tiu ĉi kampo en la senco de la Rezolucio de la 10a de decembro 1954; *(ĉ) apogi kaj helpi la daŭran eldonadon de la revuo "Juna Amiko" por lernejanoj;* (d) organizi aŭ helpi la organizon de konferencoj de instruistoj kaj gelernantoj, laŭ la ebleco sub la aŭspicioj de UNESKO. (Vd. ankaŭ punkton 8). *(e) iniciati, instigi, mem entrepreni, aŭ subteni ĉe ILEI aŭ aliaj, ĉiuspecajn lernejajn eksperimentojn por prilumi la lerneblecon de Esperanto, ĝian influon al lernado de naciaj lingvoj, ĝian efikecon kiel komunikilo inter diverslingvaj lernejanoj ktp.*

24. **Azio**: (a) *Ellabori racian planon por disvastigo de la lingvo en aziaj landoj; antaŭvidi en ĝi apartan agadon en studentaj medioj kaj ĉe evolulandaj studentoj en la industriaj landoj (Vd. III. B. 14. (h) 2.);* (b) utiligi la ekzistantajn landajn asociojn kaj la novkreitajn kernojn en Hindujo kaj Nepalo por plua disvastigo de la lingvo en ĉiuj aziaj landoj; (c) helpi la instruadon per subvencioj, almenaŭ plej modestaj, al instruistoj de Esperanto en tiuj landoj. (Vd. ankaŭ punkton 7).

25. **Afriko**: *Ellabori racian planon por disvastigo de la lingvo en afrikaj landoj* (a) per prelegoj; (b) distribuo de aparta broŝuro kaj diversaj flugfolioj; (c) artikoloj en gazetoj kaj revuoj; (ĉ) en gravaj kazoj havigo de dokumentoj de CED; (d) helpo rilate sendon de kvalifikitaj instruistoj en interkonsento kun la registaroj de la respektivaj landoj, se por tio maturiĝos la kondiĉoj; (e) okazigo de U.K. (Vd. ankaŭ punkton 7); *(f) antaŭvidi apartan agadon en studentaj medioj kaj inter afrikaj studentoj, studantaj en la industriaj landoj.*

26. **Latina Ameriko**: (a) *Ellabori racian planon por disvastigo de la lingvo en latinamerikaj landoj;* (b) fortikigi la jam ekzistantajn landajn asociojn kaj kun ilia helpo fondi novajn; (b) okazigi unu el la sekvantaj U.K. en grava centro de Suda Ameriko post kiam la lingvo estos sufiĉe disvastiĝinta sur tiu kontinento; *(c) antaŭvidi apartan agadon en studentaj medioj en Latina Ameriko kaj inter latinamerikaj studentoj en la industriaj landoj.*

B. Landaj Asocioj, Lokaj Societoj, Fakaj Organizaĵoj

27. **Landaj Asocioj**: Antaŭvidi en la programo de ĉiu LA precipe jenajn taskojn: (a) reprezentiĝi en la Nacia UNESKO-Komisiono aŭ almenaŭ kunlabori kun ĝi; (b) kunlabori kun la landa asocio por U.N., se tia ekzistas; (c) partopreni en ĉiuj manifestacioj okaze de la Tago de U.N., Tago de la Homaj Rajtoj kaj similaj datrevenoj: (ĉ) kunlabori kun la landaj sekcioj aŭ landaj organizaĵoj de internaciaj organizaĵoj, kun kiuj UEA kunlaboras sur internacia nivelo; (d) realigi kiel eble plej efikan kunlaboradon kun landaj edukaj, sciencaj, ĝenerale kulturaj kaj sociaj organizaĵoj kaj institucioj, helpante al ili korespondi per Esperanto kun parencaj organizaĵoj en eksterlando; (e) helpi al la mondaj kampanjoj de UEA laŭ specialaj planoj por la unuopaj kampanjoj; *(f) agi ĉe la nacia parlamento kaj registaro konforme al punkto 19. 1); (g) partopreni en la agado por la propono por U.N. konforme al punkto 19. 2); (ĝ) labori por starigo de parlamenta grupo konforme al punkto 19. 3); (h) labori por starigo de enlanda esplorkomisiono konforme al punkto 19. 4).*

28. **Lokaj Grupoj**: Antaŭvidi en la plano eksterajn agadojn, adekvatajn al tiuj de UEA kaj la LA nur, kompreneble, en lokaj kadroj.

29. **Fakaj Organizaĵoj**: Antaŭvidi en la programo de ĉiu FO precipe jenajn taskojn: (a) aliĝi al la samfaka neesperantista organizaĵo (elekti la plej konvenan, se ekzistas pluraj) aŭ almenaŭ trovi plej taŭgajn formojn de kunlaborado kun tiaj organizaĵoj; (b) publikigi studojn kaj artikolojn en nacilingvaj fakaj periodaĵoj: (c) publikigi Esperantlingvajn artikolojn aŭ prizorgi Esperantlingvajn resumojn en nacilingvaj libroj kaj periodaĵoj; (ĉ) enkonduki la Internacian Lingvon kiel oficialan pontolingvon aŭ unu el la oficialaj lingvoj en internaciajn fakajn konferencojn; (d) efike kunlabori kun la centraj organoj de UEA sur la kampo de enkonduko de Esperanto en fakajn mediojn.

V. KONKLUDO

30. **Centrigo kaj Malcentrigo**: Tiu ĉi Laborplano estas bazita sur la fundamenta principo centrigi ĝis maksimumo la klopodojn al difinitaj celoj kaj malcentrigi la agadon mem ĝis la plej vastaj bazoj de la organizita Esperanto-Movado. Ne nur la centraj organoj de UEA, sed ankaŭ ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi kaj ĉiu unuopa membro devas scii kien oni iras kaj kiujn celojn oni deziras atingi. Sciante tion, ĉiu organo de la Asocio kaj de la unuopaj organizaĵoj, kiel ankaŭ ĉiu individua membro, povos doni efikan helpon en plena konscio, ke agante sur unu el la niveloj – internacia, landa, loka aŭ faka – li kontribuas al la ĝenerala progresigo de la Internacia Lingvo. Ĉiuj eroj de la programo estas same gravaj kaj dependas unu de la alia. Ankaŭ la laboro sur kiu ajn nivelo, en kiu ajn el la organoj aŭ organizaĵoj, estas egale grava. Nur sukcesa plenumo de ĉiuj eroj garantias la sukcesan realigon de la Laborprogramo kiel tia kaj rezulte la proksimiĝon al la fina celo aŭ eĉ ĝian atingon en la proksima estonteco. *Ekvilibra realigado de ĉi tiu laborprogramo neeviteble rezultigos almenaŭ pli vastan establiĝon en la konscio de la publiko, en universitatoj kaj en la politika kaj kultura vivo krom en aro da diversaj specialaj medioj. La establiĝo en la politika vivo donos plian bazon por ĉiuspecaj agadoj, kaj tiuj agadoj povos ankaŭ reflektiĝi al politika vivo kaj elvoki rektajn politikajn iniciatojn kaj enlande kaj eksterlande.* Krome, sed certe ne malpli signife, la plena realigo de la Laborprogramo kaŭzos en ĉiu okazo, ke la lingvo estos multe pli vaste uzata ĉie en la mondo kaj tial la scio de Esperanto donos pli grandan utilon al ĉiu unuopulo; kaj paralele altiĝos la socia valoro de la Internacia Lingvo.

KOMENCO BONA — ĈIO BONA

Redaktoro: E.L.M. Wensing
Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando

LA LUKTO DE LA NEDERLANDANOJ KONTRAŬ LA MARO

Pro la *troloĝateco* de sia lando, la nederlandanoj forprenis multan *grundon* de la Norda Maro. Tio estas ilia pravigebla rajto. Tiuj *endigigitaj* terpecoj ne malutilas al la lando. Necesas tamen fortege protekti ilin, ĉar, kiam blovegas la aŭtunaj kaj vintraj *ŝtormoj,* la ŝaŭmantaj ondoj furioze *disbatiĝas* kontraŭ la digojn. La Norda Maro estas maro, kies plej granda profundeco atingas apenaŭ cent metrojn. Pro tio ĝia ondobato estas treege forta. Kiam venas tre alta tajdo samtempe kun nord-okcidenta vento kun uragana forto de 150 km en horo kaj ili, kunigite, vipas senkompate la digojn kvazaŭ tra funelo, tiam la akvoj povas leviĝi tiel alten, ke kelkloke la digoj cedas sub la natur-potenco.

Tio fatale okazis en tiu katastrofa kaj *glacifrosta* nokto de sabato, la 31a de januaro, al dimanĉo, la 1a de februaro 1953, do proksimume antaŭ dudek jaroj. La marakvo altiĝis ĝis unu kaj duona metroj super la mardigojn. La endigigita teritorio estis surprize atakita de tiu ĉi tajda ondego. La loĝantaro estis akre trafita kaj suferadis *ekstermezure.* Kio estas pli *angora* ol muĝanta *tempesto,* kies *perforto* rompas domojn kaj fendas digojn per sia kirlanta povo, *forfluigante* ĉion sur sia vojo! Fizike elĉerpitaj, pli ol 1400 homoj *dronmortis* dum tiu terura nokto. Kaj imagu la ĉagrenon kaj suferojn de la postvivintoj. Februaro 1953 estis neforgesebla katastrofo por Nederlando. Sed la obstina batalo kontraŭ la akvo restas, kaj la nederlanda popolo daŭrigas la lukton, forprenante de la maro tion, kion ĝi iam antaŭe forprenis de la lando.

Klarigoj:

tro-loĝ-at-ec-o: Kiam en iu lando la loĝantara nombro estas ekscesa proporcie al la ebloj de produktado, oni parolas pri "troloĝateco" de la lando. Dense loĝata lando.
grund-o: tero, sed kun speciala atento pri kulturebleco de la "grundo".
en-dig-ig-it-a: en-dig-ig-i signifas: konstrui digo(j)n ĉirkaŭ peco da tero (grundo) por protekti ĝin kontraŭ inundoj (superfluo de akvo). En Nederlando, tiuj endigigitaj terpecoj, kiuj ofte situas sub la nivelo de la marò, nomiĝas "polderoj".
ŝtormo: ventego.
dis-bat-iĝ-i: sin ĵeti kontraŭ ion kaj disfali en pecetojn. La ondegoj batas sin (batiĝas) kontraŭ la digon kaj dis-er-iĝ-as.
glaci-frost-a: malvarmega tiagrade, ke la frosto glaciigas la akvon.
ekster-mezur-e: ekster la normala(j) mezuro(j); supermezure; pli ol normale; super-home.
angor-a: derivita de la substantivo "angoro" = timego, tre granda maltrankvileco; stato de agitiĝo, premateco.
tempest-o: ventego. La vortoj ŝtormo, tempesto, uragano, tajfuno, ciklono, indikas ĉiuj diversajn specojn de ventego.
per-fort-o: la uzo de fizika forto por atingi ion, detrui ion, altrudi ion.
for-flu-ig-i: agi tiel (kaŭzi), ke io for-fluas. (La ruliĝantaj ondoj forfluigas ĉiajn malpurajojn de la strando).
dron-mort-i: morti dronante.



LONGHARULOJ

Kristina sidis hejme sur la kanapo kun sia nova amato kaj diris: "Karulo, se hazarde miaj gepatroj revenus hejmen, vi diru, ke vi estas mia amikino."

MISKOMPRENO

Ŝejla (al sia amikino): "Jes, hieraŭvespere ni sidis unu apud la alia, kaj tiam mi rekte diris al li, ke mi ne plu volas vidi lin."
Beĉja: "Kaj? Ĉu li foriris post tio?"
Ŝejla: "Ne, li elŝaltis la lumon."

LA ARTO DE KALKULADO

Diras viro al sia edzino: "Mi serioze pensas pri vendo de nia aŭto, ĉar mi ĵus legis en la ĵurnalo, ke denove plialtiĝas la prezo de benzino."
"Sed tio ja ne gravas por vi; neniam vi prenas por pli ol dek guldenoj da benzino."

ĈE BORDO DE RIVERO

"Ĉu vi estas kaptanta fiŝojn, sinjoro?"
"Ne, mi dronigas vermojn!"



Kritikisto staranta antaŭ pentraĵo:
"Nu, se tio estas arto, mi estas idioto!"
Pentristo: "Estas arto!"

Maŭra - la mistera poeto

Originale verkita por Enciklopedio de Esperanto de
MICHEL DUC GONINAZ



Unu el la plej misteraj figuroj en la tuta Esperanta literaturo – kaj samtempe unu el la plej esplorindaj – estas tiu de G.E. Maŭra, poeto laŭdire panama. La faktojn kaj famojn kolektis por ni Michel Duc Goninaz.....

Laŭdire naskiĝinta en 1905 en Panamo kaj profesie modisto (vd. *Esperanta Antologio,* 1958), Maŭra mortis la 17an de aprilo 1971 en Limoges (Francujo). La antaŭnomoj estas Georgo (hispane: Jorge) kaj Esteban. La ekzisto de tiu ĉi mistera verkisto estas dubinda, kaj estas ĝenerale konsiderate, ke *Maŭra* estas pseŭdonimo. Nur Gaston Waringhien asertis en siaj *Eseoj* (vd. "La tri aperoj de G.E. Maŭra", p. 111-116), ke li trifoje renkontis Maŭran.

Laŭ Waringhien, Maŭra estis ĉirkaŭ 1935 "belrasa, kun platigita hararo kaj kupra haŭto". Filo de hispano kaj francino, li dum la infaneco balbutis la francan, hispanan kaj usonanglan lingvojn.

Kvankam la mistero pri la personeco de Maŭra ankoraŭ ne estas plene klarigebla, estas pruvite – per ekzisto de unu sama versaĵo en la unua eldono de *Duonvoĉe* kaj en la *Libro de Amo* – ke G.E. Maŭra kaj Georgo Peterido Peneter (ankaŭ pseŭdonimo) estas la sama persono.

G.E. Maŭra publikigis siajn unuajn versojn en *Dek du poetoj* (Budapest 1934). Lia poemaro *Duonvoĉe* estis publikigita en 1939. Post longa silento, la poeto denove presigis versaĵojn de 1955 ĝis 1962 en *La Nica Literatura Revuo.* Pliampleksigita reeldono de *Duonvoĉe* aperis ĉe Stafeto en 1963. *Duonvoĉe,* la unika poemaro de G.E. Maŭra, konsistas el kvar partoj: *Amoro* (versaĵoj de la jaroj 1932-36, dediĉitaj al Mevino, la amatino de la poeto), *Amaro* (1936-45, versaĵoj dediĉitaj al la hispana kaj al la 2a tutmonda militoj), *Humuro* (satiraj epistoloj, epigramoj kaj parodioj), *Dum iro* (lirikaj versaĵoj, hajkoj kaj unuversaĵoj), ambaŭ lastaj de la jaroj 60, kun konservo de kelkaj epigramoj de la jaroj 35.

La tutan poemaron koherigas arkitekturo strikta kaj subtila, sed karakterizas granda diverseco. La naivaj versoj de la komenco (ekz. *Disiĝo*) ne falas en klišan sentimentalecon, la plej voluptemaj poemoj (ekz. *Danko*) konservas virecan ekvilibron. Maŭran karakterizas la arto de la impreso, de la trafaj bildoj, la kapto de la momenta emocio, la strebo al simpleco. Lia ĉefa ŝlosilvorto: nudo, estas konstanta simbolo ne nur de la brulanta kaj kapturniga malkovro de la virina korpo, sed ankaŭ de la "senarteco": elasteco, simpleco, lojaleco, pureco, plena akordo kun la Naturo. La aliaj ŝlosilvortoj: suno, ombro, musko, frido, frosto, malfermas la maŭran mondon de sensaĵoj. Kulminon de sia arto li atingas en la *Ekfotoj laŭ la vojo kaj Unuversaj universoj.* Lia esence lirika poezio ne ekskluzivas aliajn inspirfontojn: en *Himno, De profundis, Jesaja 53,* lia voĉo laŭtiĝas por indigno kaj vekrio kaj tremas pro kompato al la dummilite suferantaj homoj. En *Humuro,* li sprite epigramas pri la eta esperantista mondo kaj virtuoze vortludas kaj kalemburas. Li ankaŭ polemikas pri versarto sub epistola formo.

La ŝajna simpleco de la poezio de Maŭra apogiĝas sur vasta kulturo kaj multaj literaturaj influoj: latinaj kaj helenaj aŭtoroj, Biblio, francaj simbolistoj.

Uzante ĉiujn eblojn de la esperanta rimo, sed ankaŭ asonancojn kaj aliteraciojn, flegante tre diversajn poeziajn formojn kaj temojn, Maŭra kreis al si originalan tonon kaj etoson kaj okupas lokon unikan en la poezia movado fontinta el la Parnasa Gvidlibro kaj la t.n. Budapeŝta Skolo.

Michel Duc Goninaz

Bibliografio

- G.E. Maŭra: "Duonvoĉe". Budapest: Literatura Mondo, 1939. – Dua eldono. La Laguna: J.Régulo, 1963 (Stafeto, Beletraj Kajeroj, 19).

M. Duc Goninaz: "Sur la marĝenoj de G.E. Maŭra". "Norda Prismo", 1968, n-ro 3/4, p. 134-139.

Deklamas d-ro K. Kalocsay

Recenzas Rüdiger Eichholz (Kanado):

La voĉoj de prof. d-ro K. Kalocsay. Disko duflanka, monofona, fleksebla. Temmori: Amo-Akademio. 33 rpm. 18cm.

En sia serio "La Voĉalbumo de Esperanto" Amo-Akademio daŭrigas eldoni malmultekostajn disketojn kun la voĉoj de eminentaj esperantistoj. Ĝi nun kapablis registri (ne "rekordi" kiel anoncas la diskokovrilo) prezenton de d-ro Kalocsay, dum kiu li deklamas kelkajn el siaj originalaj kaj tradukitaj versaĵoj. La interligaj vortoj malkaŝas lian optimisman vivfilozofion: "La homaro saniĝos kaj povos fari tion, kio estas la esenco de la homa vivo: povos ludi." La poemoj estas rapide deklamitaj. Kelkaj enhavas maloftajn vortojn – precipe "Doña Klara" de Heine – tial estus dezirinde ankoraŭ aldoni la tekston por faciligi la komprenon.

Mendu ĉe UEA: 2,22 (por Nederlando 2,58) gld. plus sendokostoj 10%.



Fonto por Heine-esplorado

Recenzas Gaston Waringhien (Francujo):

Verkoj de Heinrich Heine en Esperanto, de Adolf Holzhaus. Tel-Aviv: Esperanto-Ligo en Israelo, 1973. 317p. 25cm. Ilus.

S-ro A.H., al kies senfina pacienco kaj esploremo ni ŝuldas la publikigon de "D-ro kaj lingvo Esperanto" kaj de "Hilelismo", nun turnis sian dediĉitecon al alia persono: li entreprenis kolekti kaj publikigi ĉiujn tradukojn de la juda germano Heinrich Heine, aperintajn en Esperantaj gazetoj, revuoj, libroj aŭ eĉ kuŝantajn manuskripte[1]. Tia kolektado kostis al li nekredeblajn penojn kaj elspezojn, sed li povas fieri, ke li sukcesis kolekti el 195 fontoj 329 tradukojn de 167 poemoj, krom 115 paĝojn el la prozaj verkoj; por ĉiu el ili li donas ankaŭ la germanan originalon. Por bone taksi la amplekson de tiu laboro, oni devas atenti, ke sub la vorto poemo A.H. enkalkulas egale la mallongajn lidojn* kaj la longajn versaĵojn (kio cetere faras la serĉadon maloportuna: la poemoj estas aranĝitaj laŭ la alfabeta ordo de sia unua verso en la germana, sed la titolojn li egale konsideris, tiel ke "Atta Troll", kun siaj Antaŭparolo kaj 27 ĉapitroj, rangiĝas inter la kvarversa "Anfangs woll' ich" kaj la kvinstrofa "Auf Flügeln.."). La kolekto prezentas iajn mankojn, ekz-e de la traduko, kiun Raymond Schwartz faris el "Belsacar"; la tekstoj estas skrupule reproduktitaj, eĉ tro, iafoje: mi supozas, ke la mislegon "La kanto de la fejn' " (p. 161) (= de l' fein') aŭ la mistranĉon de la unuaj ses versoj de "La Asroj" (p. 172) kulpis la font-gazetoj — sed la kompilinto devus ilin korekti (same, p. 172, li ne devus doni kiel de Zamenhof mian tradukon el la pra-Esperanta "Mo bella.."). La libro interesos la amatorojn de Heine kaj la specialistojn pri la tradukarto: kompari diversajn tradukojn, kiel ajn malbonaj kelkaj estas, jen ĉiam instrua ekzerco kaj iafoje plezuro.

1. Pro facile kompreneblaj motivoj, Kalocsay kaj mi ne povis konsenti al s-ro A.H. reprodukton de niaj tradukoj el Heine aperintaj libroforme en 1968 ĉe Stafeto.

* lido: germana popola lirikaĵo aŭ kanzono

Mendu ĉe UEA: 17,70 (por Nederlando 18,41) gld., plus sendokostoj 10%.

VALORA, SED DILETANTA

Recenzas Reinhard Haupenthal (F.R. Germanujo):

Unuaj libroj por esperantistoj. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1973. 156p. Bind. 22cm. (Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 1).

La klopodo rehavigi la fontojn de la lingvo estas entrepreno subteninda. Sed ĝi ne estas facila, ĉar la hodiaŭulo bezonas klarigojn kaj komentojn. La nuna verko tial plenumas sian taskon apenaŭ duone: ĝi ne donas la historiajn kaj filologiajn (eĉ ne bibliografiajn) klarigojn nek ebligas senperan impreson pri tiuj fontoj. La prezentitaj unuaj libroj estas la Esperanta traduko de la rusa *Unua Libro* (parte farita de Zamenhof por la Krestomatio, kaj kompletigita en la aldono al la fotorepreso de Setälä el 1948), la *Dua Libro de l' Lingvo Internacia* (1888) kaj ĝia *Aldono* (1888). Estas konate, ke la Unua Libro varias en siaj diversaj eldonoj (R, P, F, G) zamenhofaj. Tial efika estus nur la represo de tiu kunigita kvaropo (la germana reaperis en 1968) kun kompara filologia studo, kaj la *Dua Libro* kaj la *Aldono* (iam jam represita en 1925) nepre devintus aperi kiel fotopreso. Eĉ malatentante tiujn teknikajn mankojn (aŭ ĉu tamen ili rezultas el diletantismo de la nekonata — ĉu fikcia? —editoro?) oni ne klare kaptas la celon de la verko: ĉiuj ĝiaj tekstoj (escepte de la praekzercaro de la *Dua Libro*) estas facile atingeblaj en la Krestomatio kaj la OV. La riproĉo pri diletantismo konfirmiĝas per legado de la diversaj postparoloj: ili havas nuran felietonan karakteron. Mi bedaŭrus, se la projektata serio de plena verkaro de Zamenhof estus daŭrigata en la sama maniero.

Mendu ĉe UEA: 18 (por Nederlando 18,72) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis ...

Bambufluto, La (1973) Diversaj aŭtoroj. 207p. Ilus. 19cm. Broŝ. 3,– gld. Naŭ tradukitaj noveloj el Suda Vjetnamio.

De kant' al kanto, 2a volumo (1973) Div. verkintoj kaj tradukintoj. 72p. 13cm. Broŝ. 3,– gld. Eldonis Tokia Esperanto-Kooperativo. 30 diverslandaj kantoj kun muziknoto kaj akordindiko.

Friponeto de Tormes, La (1553) El la anonima hispanlingva originalo tradukis Ergoto de Bonaero (1973). 72p. 18cm. Broŝ. 6,36 gld. Klasikaĵo de la hispana literaturo ĝis hodiaŭ tre ŝatata.

Mercado común y diversidad lingüística (1973) Unupaĝa informfolio. 0,06 gld.

Ŝtancila terminaro, Esperanta (1973) S. Mizeruña. 14p. Ilus. 32cm. 2,40 gld. 61 terminoj kun difinoj.

Verda raketo, La (1961, fotorepreso 1973). J. Forge. 145p. Ofs. 18cm. Broŝ. 7,02 gld. (Serio Forge, 4) Noveletaro.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

LOKE - FAKE - PERSONE

LOKE

Belgujo

• La altnivela vintra programo 1973-74 de la loka societo "La verda stelo" en Antverpeno ampleksas serion de 5 prelegoj de konataj aktivuloj el kvar diversaj landoj, okazontan sub alta protekto de la belga ministro pri nederlanda kulturo kaj flandraj aferoj. La societo trafe utiligas tiujn faktojn informcele, distribuante bele presitan nederlandlingvan programfolion.

Bengalujo

• Nova libro pri la historio de la bengala lingvo, *Bangla bhaŝar itihaŝ* de d-ro Anondo-Mohon Boŝu, enhavas 4-paĝan priskribon pri la strukturo de Esperanto, verkitan de Probal Daŝgupto.

Brazilo

• En Belo Horizonte, dank'al aktivado de ties FD pri medicino d-ro Helio F. Aderne, estas inaŭgurita "Kliniko Esperanto", kiu dum la lastaj ses monatoj prizorgis pli ol 800 malriĉajn malsanulojn.

Germana DR

• La organo de Liberaldemokratia Partio de Germanujo (LDPD) en GDR *Der Morgen* ("La Mateno") ekde 1965 regule ĉiusemajne kaj ekde 1968 ĉiun duan semajnon (ĉiam dimanĉe) publikigadas Esperanto-angulon. La 300-a sekvo aperis la 17an de junio 1973. Aperis en tiu rubriko du kursoj por komencantoj, multaj principaj artikoloj pri Esperanto, ĝia signifo kaj praktika apliko, informoj el la Esperanto-movado ktp.



Hungarujo

• Ekde oktobro 1973 en Hungarujo aperas *Eszperantó Magazin.* La revuo estas ĉefe hungarlingva, grandformata kaj ilustrita. Ĝi estas destinita por tiuj kiuj interesiĝas pri la monda lingvo-problemo, sed ankoraŭ estas malmulte informitaj pri la progresoj de Esperanto.

Malagasa Respubliko

• Dank' al efika informvojaĝo de respondeculoj de la landa asocio, la Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro nun nombras ĉirkaŭ 400 membrojn en ĉiuj ses provincoj de la lando.



Peruo

• Denove la peruaj esperantistoj solenis la naskiĝdaton de d-ro Federiko Villareal, la unua pioniro de la movado en Peruo. La omaĝo okazis antaŭ lia monumento en Lima. D-ro F. Villareal estis tre grava astronomo. Li ĉeestis la 1an Universalan Kongreson de Bulonjo kaj estis amiko de d-ro Zamenhof. Peruaj esperantistoj estis ankaŭ intervjuitaj de la TV pri Esperanto en tre ŝatata ĉiutaga programo "Fenestro en la hejmo" (foto).


Portugalujo

• Aperis la 1a numero de *Revista Portuguesa de Esperanto*, 32-paĝa revuo presata paralele en la portugala kaj en Esperanto, varia laŭ enhavo kaj ilustrita. Inter aliaj sciindaĵoj la revuo informas pri la planata apero el la eldonejo "Stafeto" de la ĉefverko de la portugala literaturo "Luziado" de Luiz Vaz de Camões el la 16a jarcento, tradukita en Esperanton de la brazila poeto Leopoldo Knoedt.

Sovetunio

• En Baŝkira aŭtonoma respubliko (Rusuja federacia respubliko) la junulara ruslingva ĵurnalo *Leninec* ("Leninano") publikigis dum aŭgusto-septembro 15-lecionan kurson de Esperanto, preparitan de la komitatano de TEJO, Boris Kolker. La lasta leciono enhavis kontrolan taskon. La 5 personoj plej bone sukcesintaj rajtos senpagan partoprenon en junulara E-tendaro, aliaj 10 sukcesintoj estis premiitaj per E-libroj kaj ĉiuj partoprenintoj ricevis ateston pri sukcesa plenumo de la koresponda kurso.

• La sama ĵurnalo publikigis artikolon de B. Kolker "Lando, kiu ne estas sur mapo" (pri la Sepa Kontinento, vidu *Esperanto,* majo, p. 90), kaj ĝin tuj represis 7 lokaj ĵurnaloj.



ESPERANTO PROGRAMITA

D-ro Hans Michael Maitzen, TEJO-prezidinto, gvidis intensan kurson en la Universitato Bochum. Sur la foto li sidas ĉe la instruista ŝaltotablo. Fone staras Hermann Behrmann, kiu verkis la lingvo-laboratorian ekzercaron ampleksantan 69 sonbendojn.

PERSONE

Ciccanti

• Pastro Albino Ciccanti el Rimini, ĵus fininte sian vojaĝon tra Skandinavio, pase tra Hamburgo, estis intervjuita de la grava germana ĵurnalo *Hamburger Morgenpost.* Li donis multajn intervjuojn ankaŭ en Skandinavio. La pastro strebas per siaj vojaĝoj tra la mondo disvastigi du siajn idealojn: Esperanton kaj la idearon de la franciskana ordeno, al kiu li apartenas. Patro Ciccanti estas tiu, kiu la unuan fojon celebris meson en Esperanto en la Itala Esperanto-Kongreso en 1965, laŭ speciala rajtigo de la dioceza episkopo. De tiam la Esperantaj mesoj, nuptoj, baptoj fariĝis kutimaĵoj en la agado de la "pastro Esperanto", kiel ofte oni lin nomas.

Echtner

• Vuk Echtner, E-pioniro, prezidanto de la lingva komisiono de Ĉea kaj redaktoro de la internacia porblindula gazeto "Aŭroro", ricevis pro sia 50-jara aktiveco inter blinduloj la plej altan rekonon en tiu movado, la medalon de Emílie Suchardová.

Kaŭakami

• F-ino Tamiko Kaŭakami daŭrigas sian vojaĝon tra afrikaj landoj, kie ŝi donas intervjuojn pri Esperanto, vekante intereson por la Internacia Lingvo. En aŭgusto ŝi vizitis Centrafrikan Respublikon kaj nun vizitas la ĉe-kongajn ŝtatojn Respublikon Kongo kaj Zairon.



Neergaard

• Akademiano d-ro Paul Neergaard el Danlando, pri kies iberamerikaj spertoj ni raportis en la aprila numero de *Esperanto,* duafoje vizitis tiun kontinenton en septembro. En Buenos Aires li prelegis publike en Esperanto pri la lukto kontraŭ la malsato, kun samtempa interpretado en la hispanan lingvon.

Svislando

• Ĉe la Monda Asocio "Lernejo Instrumento al Paco" aktivas la svisa esperantista grupo "La Stelo". Rezulte de tiu kunlaboro aperis informilo en Esperanto pri tiu monda organizaĵo. La dua grava atingo de la kunlaboro estas la reprezentado de la svisa esperantistaro al la Monda Kongreso de la Frontoj al Paco, kiu okazis en Moskvo de la 24a ĝis la 31a oktobro, fare de gesinjoroj Armand kaj Yvonne Cotton. La ekzemplo de la svisa E-grupo en kunlaboro kun monda organizaĵo estas imitinda.

FAKE

Matematiko

• Matematikon enciklopedieton en Esperanto komencis kompili kaj kunlaborantojn serĉas: s-ro Włodysław Klimek, ul. Gen. Sikorskiego 134/4, PL-66 400 Gorzów Wlkp, Pollando.

Muziko

• Plurlingva informa broŝuro de la Infrasileziaj Muzikaj Festivaloj (Pollando) enhavis ĉi-jare unuafoje tekston ankaŭ en Esperanto. Petu ĝin de: Infrasilezia Muzika Asocio, ul. Świdnicka 36, PL 50-068 Wrocław, Pollando.

Radio

• La 7an de oktobro la franca radiostacio *France Culture* elsendis duhoran programon pri Esperanto.

Sporto

• S-ro Gustavo Adolfo Marqueta Siibert, dudekdujara denaska esperantisto, atleto en altsalto, estas nuntempa ĉampiono en Hispanujo.

Teatro

• La konataj polaj geaktoroj Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzyński, revene el granda turneo tra Usono kaj Kanado, prezentis en Kopenhago la duaktan teatraĵon "Proksima nekonato" en Esperanto de Alexander Ścibor-Rylski.

Terminologio

• *Dia Regno,* la organo de Kristana Esperantista Ligo Internacia, ĵus finis la felietonan publikigon de ampleksa "Kristana terminaro" de L. Kopecky kaj A. Jandík, kies partoj aperadis en ĉiu numero de post junio 1967. La terminaro estas alfabete aranĝita, kun detalaj difinoj, kaj nur esperantlingva.

TEJO-PAĜO

Usonaj studentoj povas oficiale partopreni la Hamburgan Kongreson

Jam la kvinan sinsekvan jaron Kalifornia Ŝtata Universitato en Sanfrancisko okazigos Esperanto-kursojn en 1974, sub gvidado de prof. William Auld en kunlaboro kun alia konata Esperanto-instruisto. La kursoj (komenca, meza kaj supera) okazos de la 15a de julio ĝis la 2a de aŭgusto.

Ĉi-jare tamen estos grava aldona logaĵo: studentoj aliĝintaj al unu el la tri kursoj rajtos, se ili tion elektos, partopreni kiel oficialan parton de tiu kurso la 59an UK en Hamburgo, kie ili interalie ĉeestos la prelegojn en la Internacia Somera Universitato. La kongreso koincidos kun la lasta semajno de la kursoj. Prof. Auld respondecos en Hamburgo, dum lia kolego daŭrigos la klasojn en Sanfrancisko por tiuj studentoj, kiuj ne vojaĝos al Hamburgo.

D-ro Lloyd R. O'Connor, Direktoro de Someraj Sesioj en la Universitato, skribis lastatempe: "En tiu ĉi epoko de geometrie pliiĝinta vivrapido, la kvina sukcesa jaro de io ajn meritas ian apartan memorigon."

Pliaj detaloj pri la kursoj estas riceveblaj de: Esperanto, P.O. Box 508, Burlingame, CA 94010, Usono, aŭ de: Director of Summer Sessions, California State University, 1600 Holloway Avenue, San Francisco, CA 94132, Usono.

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier. 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la juli-aŭgustan numeron.

SVISA RADIO. De novembro ĝis aprilo la sekvantaj ondlongoj estas uzataj: lunde kaj merkrede de 12.20 ĝis 12.30, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs), 13.90 m (21585 kcs); ĵaŭde kaj sabate de 21.45 ĝis 21.55, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.28 m (9590 kcs), 31.14 m (9635 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.27 m (11870 kcs).

HISPANA RADIO. La merkreda programo de la stacio EAJ 20 en Sabadell estas nun dissendata de 20.45 ĝis 21.00 per samaj ondoj. Ĉiu elsendo konsistas el rubriko "Esperanto en la mondo", kie estas resumo de la plej gravaj okazintaĵoj en la esperantista mondo, el elementa kurso kaj el legado de la plej interesaj artikoloj aperintaj en Esperantaj revuoj. La aŭdebleco estas nur loka.

USONA RADIO. La kurso de s-ino Wills estas daŭre dissendata de diversaj lokaj stacioj en Usono: Columbus (Ohio), Portland (Oregon), Walla Walla (Washington), Tampa (Florida), Oxford (Ohio), Corvallis (Oregon). Tiu kurso konsistanta el 150 kvin-minutaj sonbendoj estas havebla por angle-parolantaj landoj kontraŭ abonkotizo ĉe: S-ino Robert L. Wills, 94 Riverglen Drive, Worthington, Ohio 43085, Usono.

Nederland-Germana Seminario pri Lingvo-instruado

Antaŭ iom da tempo fondiĝis speciala ŝtata fonduso enkadre de la Nederland-Germana Kultur-Traktato, kiu celas financi junularajn renkontiĝojn inter la anoj de ambaŭ nacioj. Nun por la unua fojo ankaŭ ni, esperantistoj, provis profiti el ĝi kaj laŭeble gajni daŭran monfonton por la financado de malmultekostaj junularaj renkontiĝoj.

La etoso estis la sama, hejmeca, pro kiu jam konatiĝis plimulto de la ĝisnunaj NEJ-semajnfinoj. La malgranda junularcentro ŝajnis adekvata por gaja rondo de iom pli ol tridek personoj.

La temoj: "Lernado de la patrina lingvo", "Lingvoinstruado kaj aŭtonomecaj tendencoj en eŭropaj minoritataj grupoj", "Eblecoj kaj utiloj de instruado pri la angla en germanaj elementaj lernejoj" kaj "Lingvo-scio kaj vastigo de la internacia horizonto", same kiel la ĉi-rilataj postaj diskutoj, estis altnivelaj, kaj certe la rezulto de la aranĝo kuraĝigos estontajn oficialajn subtenojn de simila speco. Eble estas menciinde, ke, kvankam estis nederland-germana renkontiĝo, partoprenis entute ok naciecoj; la plej fore loĝantaj partoprenantoj estis niaj novzelandaj geamikoj Irene kaj Stefan MacGill. La invitilo ja avertis, ke estos seminario kaj studgrupoj por partoprenantoj kun relative alta lingvoscio, tamen estis kuraĝa areto de junaj nederlandaj komencantoj, kiuj spite venis kaj kun granda intereso partoprenis.

Resume ni diru, ke tiu septembra aranĝo en Arnhem espereble estis la unua el tuta serio de similspecaj aranĝoj.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 472, 1973-10-01

Atentigo al ĉefdelegitoj kaj delegitoj

ELEKTO de KOMITATANOJ B

Konforme al la art. 8 de la Statuto de UEA, en 1974 okazos novaj elektoj, interalie ankaŭ de komitatanoj B. Ilia oficperiodo komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Hamburgo.

Laŭ la Statuto kaj Regularoj de UEA (senpage riceveblaj de la Centra Oficejo) la elekto de komitatanoj B okazas jene: —

"La Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj elektas el internacia listo ... unu Komitatanon por 250 Delegitoj. La Vicdelegitoj kaj Fakdelegitoj ne partoprenas tiun ĉi voĉdonon." (Statuto, art. 25). "Je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31a de decembro de la pasinta jaro estas elektata po unu Komitatano B. Ĉiu komencita ducentkvindeko rajtas al plia Komitatano B." "Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio; la kandidato devas skribe konsenti al sia kandidatiĝo." (Ĝenerala Regularo, art. 28). "Povas esti elektita kiel komitatano ... nur persono, kiu estis Membro-Abonanto de UEA almenaŭ dum la 3 jaroj antaŭ la jaro de la elektoj." (art. 30). "Ĉiuj Komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj." (Statuto, art. 25).

En la momento de redakto (nome, antaŭ la fino de 1973) la nombro de elekteblaj komitatanoj B ankoraŭ ne estas certa, ĉar ĝin fiksos la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj je la 31a de decembro. Antaŭvideble, tamen, la nombro estos ĉirkaŭ ses. La direktoro de la Centra Oficejo petas la ĉefdelegitojn kaj delegitojn (ne la vicdelegitojn aŭ fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj kun iliaj skribaj konsentoj **antaŭ la 1a de februaro 1974.** La proponantoj bonvolu zorgi, ke la kandidatigoj estu konformaj al la Statuto kaj Regularoj, kaj ke ili atingu la Centran Oficejon (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando) antaŭ la indikita dato kune kun koncizaj biografiaj informoj pri la kandidato kaj pri lia ĝisnuna agado en la Esperanto-movado.

Post la forpaso de la fiksita dato, se la nombro de kandidatoj superos tiun de elektotaj komitatanoj B, la direktoro voĉdonigos ĉiujn ĉefdelegitojn kaj delegitojn, kiuj rajtas voĉdoni. Pri la rezulto aperos informo en la gazeto.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Van Dooren, F., Belgujo.
Canne Meijer-Hoogland, s-ino G.E., Nederlando.
Dunnewold-Ehrmann, s-ino J., Nederlando.
Prins, f-ino J., Nederlando.
Sannen, G.J., Nederlando.
Stienstra, f-ino T., Nederlando.
Tiessen-Spaans, s-ino A., Nederlando.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

305 A.E. Costa Pereira, Brazilo. 306 H.D. Palmer, Britujo.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-12-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: George Clarke, D kaj FD Orroroo. **Belgujo:** Agnes Coene-Geelen, FD Deurne, Peter-Jan Notaerts, FD Dilbeek. **Finnlando:** Selma Järvinen, D Lauritsala, Veikko Tikkanen, D Turku. **Francujo:** Jacques Neukomm, D Antibes. **FR Germanujo:** Rudolf Brand, FD Bamberg, Günther Doliwa, D kaj FD Bomlitz, Charlotte Holzmann, FD Bonn, Anna Maria Orterer, D Enterbach, Siegfried Schlumberger, FD Heidenheim, Berta Helfers, D Karlsruhe, Dirk Willkommen, FD Kiel, Wolfgang Zedler, D Soest, Gerd Brinkmann, FD Westerland. **Hungarujo:** Emil Máté, Károly Bódis, Ferenc Kucsera, FD-oj en Dunaujváros, Imre Ferenczy, FD Győr, József Magyari, D kaj FD Salgótarján. **Italujo:** Giovanni Battista Briano, FD Genova, Silvio Stoppoloni, JD Pistoia, Giovanni Barbieri, FD Sarezzano, Ariella Colombin, FD Trieste. **Jugoslavio:** Dušanka Kačarević, VD Beograd, Franjo Petričević, D kaj KD Koprivnica, Radenko Milošević, FD Zagreb. **Malagasa Resp.:** Claude D.G. Ramanantsoa, D kaj FD Tananarivo. **Svislando:** Kurt Greutert, FD Bellinzona, David Bühlmann, D Lausanne, Tazio Carlevaro, D kaj FD Novazzano. **Usono:** Thomas Goodman, VD kaj FD Baltimore, Gerald Cirrincione, VD Boston, Edward Fratini, D kaj FD Petaluma, Lee Edwards, FD San Diego, Robert Bailey, FD San Francisco.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1973, Unua Parto, pro adreŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj).

Belgujo: Deurne (JD). **Finnlando:** Turku (D H. Riikonen). **FR Germanujo:** Heidelberg (D), Kreuth, Lengerich, Flensburg, Oberhausen-Sterkrade, St. Martin (JD), Stuttgart (FD religio: evangelia). **Hispanujo:** Barcelona (FD turismo). **Italujo:** Bologna (FD instruado), Lecce. **Japanujo:** Nagoya (D). **Jugoslavio:** Zagreb (FD instruado). **Svedujo:** Karlskrona. **Svislando:** Chez-le-Bart, Bellinzona (JD, FD interlingvistiko), Genève, Giubiasco (FD fervojo). **Tunizio:** Sfax. **Usono:** Bronx (FD religio: katolika), San Antonio (VD kaj JD).

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

En la numero de novembro 1972 vi povis legi ion pri la evoluo de la "membroj-subtenantoj" (MS) kaj "dumvivaj membroj" (DM) en komparo kun la nombro de ĉiuj membroj, kiuj ricevas la revuon kaj la jarlibron. En 1973 la nombro de MS iom kreskis. Ĉu interalie la nomita artikolo havis influon? La respondon mi ne scias; mi povas nur esperi.

Ekde la jaro 1974 la kotizo por la kategorio "membroj-abonantoj" (MA) fariĝos 40,– gld., kaj tiu por MS 60,– gld. Nome de la Estraro mi deziras esprimi la esperon, ke tamen montriĝos, ke en 1974 la nombro de MS ne restos sub tiu por 1973. Ĉiu, kiu laboras por la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj kiu scias, kion faras UEA, komprenas, ke tiu alta kotizo de MS estas necesa por la de UEA farenda laboro.

E.J. Woessink, estrarano pri financoj

DONACOJ 1973 (Gld.)

Fondaĵo Azio-Afriko: Belgujo: G. Pirlot, 13,50; Sumo ĝisnuna: 235,50 gld.

Fondaĵo Canuto: Aŭstrujo: K. Reinisch, 145,65; Britujo: I. Lapenna, 120,– (por MA-K'oj); Nederlando: E.J. Woessink, 40,–; Sovetunio: S-ino F. Tammekänd, 10,40. Sumo ĝisnuna: 2 646,35 gld.

Ĝenerala kaso: Britujo: F-ino C.M. Pritchard, 6,63; Japanujo: M. Iwaya, 3,10; Nederlando: M. Meijwes, 3,–; Anonime: 37,06. Sumo ĝisnuna: 1194,17 gld.

Kampanjo 100 x 100 (por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum 3 jaroj ekde 1971 po 100,– gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj):

Sumo donacita por 1971: 5 300,– gld.
Sumo donacita por 1972: 6 600,– gld.
Sumo ĝis nun por 1973: 4 201,12 gld.

Patrona membro A de TEJO 1973: 24 G. Pirlot, Belgujo.

Patrona membro B de TEJO 1973: 1. R.S. Baldwin, Usono.

Patrona membro A de TEJO 1974: 1 I. Lapenna, Britujo.

Propaganda konto: Aŭstrujo: H. Bauer, 144,95; Belgujo: G. Vanbreuse, 35,–; Britujo: Ges-roj T. Fraser, 40,75; I. Lapenna, 170,–; FR Germanujo: M. Kossolobow, 21,68; Nederlando: J. Boer, 15,–; J. Dunnewold-Ehrmann, 50,–; S-ino A. Ch.Th. Nijhoff, 1000,–; G. Takens-Bakker, 10,–; Portugalujo: A. Rodrigues Correia, 50,–; Svedujo: A. Jägervall, 63,–; S-ino A.H.L. Nilsson, 59,54; Svislando: W. Kobelt, 108,34; Usono: Ges-roj V.A. Griffeth, 21,91; Anonime: 25,–. Sumo ĝisnuna: 2 282,32 gld.

Kiel montras la ĉi-supraj ciferoj, la reago de la membraro al nia alvoko "Helpu nin helpi ilin" en la julia-aŭgusta numero de *Esperanto* estis vere malavara kaj kuraĝiga. Krome ni aparte dankas al pluraj, kiuj kontribuis per donaco de lernolibroj aŭ per proponoj starigi kontakton kun lernantoj en landoj sen organizita movado. Speciale ni mencias kun danko la nomon de Internacia Esperanto-Instituto (en Hago), kiu kontribuis per pluraj centoj da lerno- kaj legolibroj.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio


KOREKTO

En la oktobra *Esperanto,* sur p. 180 en *Oficiala Informilo,* inter la ne plu validaj delegitoj estis menciita sub Pollando: Chorzów (D). Ni petas pardonon pro la erara informo. S-ro Kloska daŭre restas D por Chorzów.

ANONCETOJ

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (t.e. 1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.

La tornistro (por instruo kaj por distro) No. 1. Literatura jarkajero ilustrita. Varia enhavo: artikoloj, poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, ktp. 52p. 22cm. Prezo: 5 gld. Mendu ĉe UEA; aŭ kontraŭ 5 gld., egalvaloro aŭ 10 internaciaj respondkuponoj, ĉe Argentina Esperanto-Instituto, C.C. 58, Suc. 12, Buenos Aires, Argentino.



Stojan Ŝopov, str. D. Gruev' 16, Târgoviŝte, Bulgarujo. Deziras korespondi tutmonde. Respondo certa.

John Murphy, D-307 Nienburg, Oldenburger Strasse 6A, FR Germanujo, volus korespondi kun rusa bekflutisto.

Propagandu Esperanton pere de diversnacialingvaj glumarkoj. Informoj ĉe R.v.d. Outenaar, Merkmanstraat 5, Haarlem, Nederlando.

Sendu gratulojn okaze de SIA al "Esperanto", DK "Energetik", Semaŝko, 48, Rostov-Don-7, USSR; ĉiu ricevos dank-respondon (ĝis 1974-02-10).

Bulgara fraŭlino, inteligenta, deziras konatiĝi letere (Esperante aŭ france) kun fraŭlo, eksedziĝinto aŭ vidvo, 40-45 jara el okcidenta Eŭropo. Celo: edziĝo. Skribu al peranto: W. Klingenberg, 3200 Hildesheim (Germanujo), Lappenberg 1.

Deziras korespondi kun la tuta mondo. Temoj: popolfabeloj, infanfabeloj, popol- kaj infanmelodioj, belaj poŝtkartoj kun birdoj kaj floroj. S-ino Noore Vahter, Ranniku tee 11, 200021 Tallinn, Estonio.

Ni serĉas esperantistojn, kiuj ankaŭ suferas je la haŭt-malsano psoriazo. The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, Britujo. Represo petata.

Samseksemuloj viraj kaj inaj – Kunlaboru por krei internacian gesamseksemulan grupon por reciproka amikeco kaj helpo per Esperanto. Ni povos starigi utilajn servojn: korespondan, vojaĝan, novaĵan, ktp. Ni rompu nian izolitecon! Via identeco restos tute konfidenca. Oni rajtas uzi kaŝnomon, se oni preferas. Sugestoj kaj gekunlaborantoj serĉataj. Skribu al: Ulo, 11325 Blix Street, North Hollywood, California 91602, Usono (U.S.A.).

NOVA! Sinjorinoj, ne plu hezitu!
En Rotterdam malfermiĝis la plej granda nederlanda peltvendejo: La Peltopalaco.
Kiel malferma reklamo por ĉiuj

PELTMANTELOJ

kaj

PELTĈAPELOJ

20% rabato. Skriba garantio. Laŭdezire tre flekseblaj kreditkondiĉoj. Vojaĝkoston por du personoj en Nederlando ni kompensas ĉe aĉeto. Het Bontpaleis, "Onder de Laurenstoren", Hoogstraat 153, Rotterdam-C, tel. (010) 14 33 37. Vendrede aĉetvespero.

La legolibro, kiun ni plej bezonis



Novspeca legolibro enhavanta 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, parolturnoj, demandoj kaj respondoj kaj kun 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj. La tekstoj estas laŭgrade aranĝitaj.

Verkita en simpla stilo por faciligi al novaj lernantoj paroli la Internacian Lingvon

141 pj. Poŝformata (22 x 12 cm)

Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Arfoll. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

Antaŭ Hamburgo tra pitoreska Nederlando

La planata aŭtobusa ekskurso realiĝos, ĉar jam anoncis sin interesitoj el 17 landoj. Kiu intencas partopreni ne longe hezitu, ĉar baldaŭ mankos lokoj. (Vidu aldonitan folion en sept. no. '73 de tiu ĉi revuo).

TEMPO: Komenciĝo en Rotterdam dimanĉon 14 julio. Alveno al Hamburgo ĵaŭdon 25 julio 1974.

PROGRAMO: kvar, tri kaj denove kvar tranoktoj en unuarangaj hoteloj en resp. la okcidenta, meza kaj norda partoj de Nederlando. Ekskursoj en tiuj regionoj akcentantaj kulturajn kaj naturajn belaĵojn.

PREZO (laŭ nunaj cirkonstancoj): inkl. de 11 tranoktoj en dulitaj ĉambroj kun duŝo aŭ banĉambro, tri manĝoj kaj du ekstraj nealkoholaj trinkaĵoj tage, ĉiuj veturoj, ekskursoj, enirprezoj, servmono, imposto ktp., 885,– gld. (Unulitaj ĉambroj estas malmultaj kaj kostaj).

ALIĜOJ, PAGOJ, INFORMOJ: Por ĉio òni turnu sin al F-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, II, R, Rotterdam-3002. Tel. (010) 36 45 42. Pĉk: 33 37 90.

GRAMOFONDISKO DE NIKOLAJ RYTJKOV

GRUPO KVIN (ESPERANTO EN RADIO KAJ TELEVIDO) informas, ke sub ĝia aŭspicio – honore al ĝia kunlaborinto Nikolaj Rytjkov, kiu ĝis sia morto kunlaboris en la produktado de radio-kurso – la organizanto s-ro Peter Schilperoord eldonos longedaŭran gramofondiskon kun


ELEKTITAJ EROJ

el recitaloj de Nikolaj. La redaktadon prenis sur sin nia poeto Reto Rossetti.

Prezo: £2,30 aŭ 15 guldenoj (por Nederlando 17,40 guldenoj) plus sendokostoj 10%.

Notu bone: *nur* la personoj, kiuj mendos la diskon antaŭ la 15a de marto 1974 (kun samtempa pago) ricevos aldone kun la disko donace portreton de Nikolaj desegnitan de la japana artistino Misako Aihara.

La liverdato estos en la printempo 1974. Bonvolu tuj mendi aŭ rekte ĉe UEA aŭ pere de via kutima libroservo.



Bona ideo ... por viaj peltaĵoj
ĉiukaze rigardi en la plej granda kaj plej malmultekosta peltvendejo de Nederlando.
Miloj da mallongaj kaj longaj

PELTMANTELOJ

peltaj ĉapeloj kaj kolumoj kontraŭ allogaj, malaltaj, pageblaj prezoj!
Aĉeti peltaĵon baziĝas sur fido. Trijara garantiatesto indas tiun fidon. Pli da garantio por pelto. Laŭdezire tre flekseblaj kreditkondiĉoj.

DE BONTKONING, Hoogstraat 97, Rotterdam-C, tel. (010) 117.117. Granda aŭtoparkejo antaŭ la magazeno.
Ĉe aĉeto por du personoj: repago de kostoj de vojaĝo en Nederlando per aŭtobuso, vagonaro aŭ propra aŭto. Do vojaĝo senpaga.
Vendredvespere malfermita ĝis la 21.00 h.

HEROLDO
DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO
De 53 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 18 numeroj jare
- 2 senpagaj dupaĝaj suplementoj pri literaturo kaj scienco
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA Jarabono: 335 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1**
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska